

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

Jarabono : 40 fkoj

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1978 - 5

KULTURAJ KAJEROJ

1978 SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Kulturaj aranĝoj 1979 de la Esperantista Kulturdomo

Esperanto tra la monde A. Frangeul

La Alpetoj (fino) J.-P. Beau

La Bretona Lingvo F. Le Magadure

Du japanaj rakontoj trad. Zin Kiyosi

Sciencfikcio Vilem

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Gresillon F-49150 Baugé
Poŝtkonto : NANTES 1485 39 P

Telefono :
dum la aranĝoj (41) 89 10 34
ekster la aranĝoj (40) 76 77 95

KULTURAJ ARANĜOJ 1979

Printempo :

alveno 11 an de Aprilo posttagmeze
foriro 18 an de Aprilo matene.
— Renkonto de infanoj
— Praktika pedagogio

Somero :

PRELEGOJ

de lundo 2-a de Julio ĝis sabato 21-a de Julio

— Tritemaj prelegoj
— Diskutoj
— Praktiko kaj studo de la lingvo
— Teatra laboro
— Ekskursoj

KURSOJ

de lundo 23-a de Julio ĝis sabato 11-a de Aŭgusto

— Rektmetoda kurso por komencantoj
— Grupa praktikado
— Studado de la lingvo (tradukado, studado de verkaĵo, teatro...)
— Manlaboroj
— Ekskursoj

ARTLABOROJ

de lundo 13-a de Aŭgusto ĝis sabato 1-a de Septembro

— Fotoarto (fotado, rivelado, prezento de fotoj...)
— Folkloraj dancoj
— Studado kaj praktiko de la lingvo
— Ekskursoj

N.B. — Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj kvankam le celo de la kursoj ne estas la preparado de tiuj ekzamenoj.

Esperanto tra la Mondo

Pri la U.E.A.-kongreso en Varna

— Proksimume 4500 geesperantistoj kunvenis en Bulgario por la 63a universala kongreso, la plej amasa kongreso depost 55 jaroj. 51 landoj estis reprezentitaj.

— Ĉeesto de ĉina delegacio estis nova signo de reaktivado de esperanto-movado en Ĉinio.

— La reprezentantoj de Rumanio same konfirmis la aperon de pli favora klimato por la internacia lingvo en tiu lando : estiĝo de kolektivo esperanto-interlingvistiko en la akademio pri sociaj kaj politikaj sciencoj, ebleco enkonduki esperanton kiel pedagogian studobjekton en filologiajn fakultatojn, eldono esperantlingva de la jubilea numero de « Ferioj en Rumanio ».

— Aliĝis al U.E.A. (anonco dum la kongreso) la naciaj esperanto-asocioj de Meksikio, Malto, Venezuelo, Peruo. Realiĝis Brazila Esperanto-Ligo.

— La festparolado de la solena malfermo estis farita de la prezidanto de U.E.A., D-ro Humphrey Tonkin. Li, interalie diris : « Unu el la plej kuraĝigaj evoluoj de la lastaj jaroj estas ĝuste la kresko de scienca interesiĝo pri Esperanto... Se ni ne konvinkos la sciencistojn, estas vane konvinki la politikistojn. Fakte, ni devas labori sur ambaŭ kampoj samtempe. »

— Inter la multaj fakaj grupoj, kiuj kunvenis, ni notu la komputistojn kaj komputilistojn, kiuj povas daŭre rilati kun la respondeculo: S-ro Antal Münnich, Szalonka ut. 4/b. H. 1025 Budapeŝto.

— Unuafoje en la historio de la universalaj kongresoj, okazis esperantologia konferenco, sub la gvidado de D-r Detlev Blanke (Germana D.R.). La sukceso estis tre granda.

— Paralele, 10 prelegoj estis faritaj en la kadro de la tradicia Internacia Somera Universitato.

— 178 verkoj konkuris por la belartaj konkursoj.

— Ĉirkaŭ 70 geknaboj partoprenis la « Infanan kongreseton ».

— Finfine, ni notu ke tiu kongreso estis impona, sed ke, tamen, eble pro la escepta granda nombro da partoprenantoj, eble pro lokaj apartaĵoj, diversaj mankoj estis rimarkitaj en la organizado.

La S.A.T.-kongreso en Lekturo

— 272 geesperantistoj el 13 landoj ĉeestis la S.A.T.-kongreson en Lekturo (Lectoure, Francio).

— Dum la malfermo, ĉeestis la socialista urbestro, kiu alparolis la kongresanojn rekte en Esperanto, la departamenta deputito socialista, kaj la nacia sekretario de konstrulaborista sindikato (C.G.T.).

— Okazis 4 laborkunsidoj kaj 2 debat-kunsidoj. Dum tiuj du lastaj, la kongresanoj arde diskutis pri Ekologio kaj Etnismo.

— La gvidrezolucio ĉefe temas pri homaj rajtoj kaj paco. Ĝi « protestas kontraŭ tio, ke malgraŭ siaj solenaj deklaroj, la ŝtatoj senĝene malrespektas la homajn rajtojn... ». Ĝi plue diras : « Dum ŝajne ne estas materia limo al la disdonado de armiloj por nutri lokajn konfliktojn, en kiuj milope homoj trovas kruelan morton, paca vivo, sekureco kaj protekto kontraŭ malsano estas plu rifuzita al la plimulto de la homoj ».

T.E.J.O.-kongreso en Veliko Tarnovo

450 gejunuloj ĉeestis tiun kongreson. Tiuj junaj geesperantistoj venis el 26 landoj por certigi la sukceson de la 34a Internacia Junulara Kongreso en tiu historia urbo de Bulgario.

La komitato akceptis la aliĝpeton de la junulara sekcio de Ĉeha Esperanto-Asocio (nun estas 31 landaj sekcioj en T.E.J.O.).

La latin-amerika kongreso

Ĝi okazis dum Julio (17-22a) en Marilia (Brazilo) kun 500 partoprenantoj el 8 landoj de Ameriko kaj ricevis subtenon de la aŭtoritatoj.

Teatra renkontiĝo

Ne estas tro malfrue por signali la sukceson, fine de Majo, de la Teatra Esperanto-Renkontiĝo en Pollando.

Dum tri tagoj, okazis ses spektakloj en Gdansk, kun artistoj el kvar landoj.

Ĉinio partoprenas la Pupteatran Festivalon en Zagreb

Evidenta signo de pli favora sintenado por Esperanto en Ĉinio, estis la informo ke la kultura ministerio de Ĉinio decidis sendi, laŭ invito, la pupteatran trupon de Pekino por partopreni en la 11a Internacia Pupteatra Festivalo en Jugoslavio, dum Oktobro.

La gazeto « El Popola Ĉinio » raportis pri la kurso de Esperanto speciale aranĝita por la artistoj (oni scias ke la Internacia Lingvo estas la oficiala lingvo de tiu festivalo).

La ĉina trupo prezentos klasikaĵon : « Ribelo kontraŭ la ĉiela palaco ».

Provo de semajna magazino

Konata germana esperantisto, S-ro Maul (Singerstr. 1/II, D-8900 Augsburg) intencas lanĉi « Semajno » internacian magazinon sendependan.

Renkonto dum la foiro de Leipzig

La Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo dum la foiro de Leipzig okazos inter la 9a kaj la 11 a de Marto 1979. Adreso : J. Hamann, Püchanerstr. 3, D.D.R.-705 Leipzig.

Por la skiantoj...

La Internacia Fervojista Esperanto-Semajno (malfermita al ĉiuj esperantistoj) okazos en Maria Alm, en Aŭstrio, inter la 17a kaj la 24a de Marto 1979. Adreso : A.F.E.F., A-1103 Wien, postfach 117.

LA ALPETOJ (fino)

Post la marta stucado de la vitejoj venis tiu, pli grava, de la fruktarboj, ĉefe de la olivarboj. Maljunulo helpis la patron en tiu laboro : li ĉion sciis. Li bonvole prelegetis, konis la ritajn kantojn, kaj Maria lernis pli multe ol en la lernejo. La lernejon ŝi ja preskaŭ neniam mencias : tie oni punis ŝin kiam ŝi ne parolis france. Ŝi pli ŝatis la naturajn lecionojn, kaj senerare sciis laŭ kia ordo floras la diversaj fruktarboj, aŭ kiel statas la luno ..., nocioj perditaj, ĉu ne, ĉe niaj modernaj urbanoj.

Rondiru la Rozo ! La olivarboj defloriĝis. Aprile, la pli riĉaj tondis la ŝafojn, kaj, laŭ la proverbo, « la malriĉuloj tondis siajn kaprinojn. »

Jam ĉiuj observis atente la foliojn de la morusarbo. Ĉu ĉijare ĝi fruos aŭ ne ? Ĉu Sankta Georgo, ĉu Sankta Marko signalos ? Forta tempo de la jara melodio : sed decidis la sezono. Je la difinita tago, la patrino prenis el tirkesto skatoleton longan el tre maldika ligno. Sur la kovrilo videblis multkolore palmarboj, kameloj, Araboj. Estis « lou massapan ». Ekzistis unu tia en ĉiu domo, aĉetita la antaŭan jaron okaze de la Foiro de Beaucaire, plena je daktiloj por la kristnaska vespermanĝo. Ĝin nun malplenan la patrino kunportis ĉe la farmaciiston, por aĉeti du uncojn da « semo ». Kia semo ? La « semo » de la silkraŭpoj. Tre singarde oni lokis ĝin, dumtage, sur la kamenbreto ; nokte, ĝi migris en la liton de Maria, apud la varma botelo, ĉar Maria « ne troskuiĝis dumnokte ». Post semajno, en la dolĉa varmo, naskiĝis la raŭpetoj.

Tiam komenciĝis la peniga rikoltado de la folioj de la morusarboj. Ĉar neniam rito forestis, la unuaj folioj devis esti ŝtelitaj de infanaj manoj sur morusarbo de najbaro. La rikoltado mobilizis ne nur la tutan hejmanaron, sed ankaŭ du dungatinojn, la « Majknabinojn ». En la subtegmento, sur hurdoj, oni dismetis erikbranĉojn. La raŭpoj ogre voris la foliaĵon, kun pluva bruo. De l'matenblanko ĝis la nokto kun lanternoj, oni devis nutri ilin senĉese. Post kvar semajnoj — kiam ĉio iris glate — la bestetoj ekgrimpis sur la erikon, por ŝpini siajn kokonojn. Uf ? Eĉ ne uf ! Ĉar, dum la mistero de la kokoniĝo plu evoluis en la ombra subtegmento, la familianoj devis rikolti la fojnon : plua eluzanta laboro. Ĉiuvespere, venkopremitaj de la laceco, ili sinkis en sensonĝan dormon, kaj eĉ la najtingalo jam alveninta, kiu kantadis la tutan nokton, ne sukcesis, ilin veki.

Infera Majo ! Des pli triumfa Junio, kiam la Rado de l'Tempo ĝiris al la kokonrikolto, « lou descoucounage ». Festa laboro, nun tute perdita. Festo de abundo kaj repago post la senripoza strebado ; festo de kunlaboremo, ĉar la dungado estis reciproka. Ĉiuj najbaroj alvenis frumatene kun kantoj kaj ridoj, en la odoro de la matena kafo. Tiun tagon, la solan dum la tuta jaro, la infanoj rajtis ne iri al la lernejo. Jam la antaŭan vesperon oni pretigis la florumitan tablegon, la solenan manĝon — ŝafidon, orelkukojn ktp., kaj eĉ la tutfruajn florfigojn de la ĝardeno, kaj, kompreneble, la muskatovinon. Ĉiuj laboris, rakontadis, kantis sian — antaŭviditan — kanton, ridis, manĝis kaj trinkis, ĝis la vesperaj lanternoj.

Morgaŭ la eriko amasiĝos sur la draŝejo por la fajro de Sankta Johano, la silka trezoro foriros ĉe la malbobeniston, kaj la mono, laŭ la Arleza leĝo, revenos al la poŝo de la patrino.

Iom malfruiĝinte ĉe tiu petalo de la Jara Rozo, ni nun pli rapide turnu la radon de la monatoj.

Julion akompanis la terura rikolto de la tritiko, kaj la draŝado sur la ronda ŝtona draŝejo. Ankaŭ venis vice la ĉiujara mirinda vojaĝo al la Foiro de Beaucaire, vere festa tago por tiuj infanoj, ne ĉiel trosataj kiel ofte la nunaj.

Aŭguste, la kamparanoj rikoltis la migdalojn. Revenante hejmen kun sakoj plenaj sur la ĉareto, ili sentetis, ke la ora lumo de l'vespero jam silente parolas pri Aŭtuno.

Septembre revenis la ŝafaro de la transmigrado, kaj okazis la unuaj ĉefajraj vesperkunvenoj...

Glatpaŝe, Oktobro ridetis al la vinberrikolto, ĉiam laciga sed ĝojoplena. Baldaŭ ĉiuj kunvenis por gustumi la novan vinon kun kaŝtanoj. Post la Tago de Ĉiuj Sanktuloj, aŭ eble Sankta Marteno, jam la plej belaj olivoj verdaj — kutime la « Salonaj » — estis rompitaj en salakvo kun fenkolo.

Fine, unu tagon frostecan de Novembro, ofte kun mistralo abomeninda, la trupo migris al la olivejoj, por tie kolekti « li tresor roucassié », la trezoron de la rokoj, la olivojn. Ne ie ajn la piknikejo : ŝirme de roko, oni kune manĝis la tripkolbasojn, rostitajn sur fajro de sarmentoj. Kiam, iom poste, la riĉa oleo revenis de la muelejo al la bieno, jam, ne fore, aperis la silueto de « Calendo », la Provenca Kristnasko.

Tia estis la vivo kampara en la Alpetoj, sur la sojlo de nia jarcento. Certe tiuj homoj konis kontraŭaĵojn : malsanoj, fuŝitaj rikoltoj, la silkraŭpoj mortigitaj de la ŝtormo en Majo, la ĉarplenoj da legomoj revenante ne venditaj. Ne ĉiu vento estis milda zefiro sur la Rado de la Ventoj. Sed ili amis sian vivon : se la vorto feliĉo havas signifon, ili estis feliĉaj. Ĉu ne bela difino de feliĉo, kiam la plej premaj travivaĵoj kaj severaj laboroj estas samtempe la plej gajaj horoj ? Maloftiĝas tiu harmonio. Nia malsana jarcento detruis ekvilibron, sed ankoraŭ ne trovis alian. Hodiaŭ la kamparanoj malmultiĝis en Alpetoj. La restantoj havas alispecan vivon, kun novaj problemoj. Cetere, ne ĉiuj ŝanĝiĝoj estas malavantaĝaj. Ĉiaokaze, aperas nepre plej grave, ke ili ne plue malaperu : kie ekmankas kamparanoj, io neanstataŭebla detruiĝis.

Tiu minaco ekzistas nun en la Alpetoj : ne mirinde do, ke ili estas nun la teatro de batalo, eĉ milito.

Sur unu flanko staras la kamparaj komunumoj, laŭ la varia mezuro de ilia komprenemo de siaj veraj interesoj ; — kun ili, ĉiuj, kiuj komprenis sufiĉe frue, ke la homo ankoraŭ bezonas nematerialajn posedaĵojn, kaj purajn aeron kaj akvon, kaj naturajn spacojn, kie li povas sin rekolekti, meze de la universo de vivo de kie li fontas.

Sur la alia flanko, la batalantoj de materiala progreso senkondiĉa, kaj ĉefe de spekulemo kaj avidemo al profito, pretaj ĉion detrui aŭ fuŝi por atingi siajn celojn.

De tiu batalo ni citos du ekzemplojn.

1968 : Demono minacas la Alpetojn. Kiu demono ? La demono de oro, sed ĉikaze maskovestita kiel demono de l'aluminio. Kiel sciate, la erco nomiĝas « baŭksito », kaj la fama kastelo sidas sur monto da erco. Kial mirakle Péchiney interesiĝas subite pri tiu loko ? Ŝajnis, ke aliaj ercoj estis pli bonaj kaj profitodonaj ; nu la miraklo nomiĝas Fos-sur-Mer. Fos estas tute proksima. Bela komerca okazo, kiu indas ke oni detruu privilegiajn pejzaĝojn, ke oni trufu la grundon per galerioj, kaj ĵetu sur la plej belajn kaj antikvajn vojojn de Provenco karuselon de kamionoj, kiuj en venta vetero ruĝe ŝmiras la tutan pejzaĝon.

Por tia sakrilegio necesas permesoj. Du permesoj : du Ministroj, Industrio, kaj Kulturo. La Ministro de Industrio subskribas preskaŭ dumane. Sed kio pri la Kulturo ? Kiam la dosiero alvenas ĉe tiun lastan Ministron, tiu-ĉi ridetas... kaj subskribas. Mirinde, ĉu ? Sed bone rigardu la vizaĝojn de la du Ministroj. Ambaŭ kapoj apartenas al la sama homo. Sro Bettencourt. Sro Michelet, Ministro pri Kulturo, malsanas. La Ministro de Industrio anstataŭas lin provizore...

Antaŭen ! Antaŭen al la disrabo de la lando glorita de Mistral, prikantita de Daudet, pentrita de Van Gogh. Aluminio estas necesa por niaj kaseroloj, kaj dividendoj por niaj akciuloj.

Dio — aŭ Satano — estu dankata , Mistral, Daudet, Van Gogh kaj aliaj postlasis heredantojn. Marie Mauron, Bizette-Lindet, Yvan Audouard, kaj multaj amikoj de belo kaj naturo mobiliziĝas, kaj kreas (1969) Ligon por la Defendo de la Alpetoj. Aliĝoj alfluas. Alilandanoj alkuras, i.a. la sindonema Sviso Franz Weber, kiu antaŭe militis por sia hejma Engadino.

Ekbataliĝas. Leteroj. Raportoj. Peticio : ĝi rondiras inter la loka loĝantaro, en la tuta lando, kaj eĉ eksterlande, kaj kolektas 100.000 subskribojn. La gazetaro, la radio, la televido helpas. La germana televido sendas taĉmenton. Partoprenas la Angla Reĝino, kaj la Princo de Monako. Pri tiu lasta, oni devas memori, ke la familio Grimaldi ricevis de la Reĝo Ludoviko XIII-a la markizecon de « Les Baux », kaj tenis la bienon ĝis la Franca Revolucio. Ĉiuj teksas ĉirkaŭ la Alpetoj reton de simpatio. Péchiney kaj Les Baux aperas bilde kvazaŭ Vezuvio kaj Pompejo respektive.

Péchiney kontraŭatakas per luksa broŝuro. Teksto admirinda. Ni citas : Jam juvelo arta kaj turisma, la Alpetoj iĝis nun glorloko de la industria historio... Pilgrimante al la fontoj, Péchiney konscias, ke ĝi entreprenas delikatan ekspluatadon, Ĝi firme intencas, ĝin bone efektivigi, en respekto de la rimarkinda pejzaĝo de la Alpetoj, kaj de iliaj enloĝantoj. « Kiel bele dirite ; Oni kredas — skribas F. Weber — aŭdi la kirurgon, kiu trankviligas sian pacientinon : « Sinjorino, mi fortrancos de vi la du mamojn kaj ovariojn, sed mi operacios vin kun plena respekto al via virineco ! »

Komence, Péchiney ekspluatis senzorge. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam la mistralo blovis, ĝis nevideblo inter Maussane kaj Les Baux la pejzaĝo estis ruĝa. Ruĝis la vitejoj ; ruĝis la pinarbejoj kaj olivarbejoj. Tamen, tiu indignokriego loka, nacia kaj eĉ internacia urĝis Péchiney al pli da zorgemo. Post longa traktado estiĝis provizora interkonsento, kaj, verdire Péchiney ĝis nun respektis la oficialan kontrakton, akvis la ercon, fosis kun singardo, rekovris loke per 40 cm da tero, replantis arbojn, ktp. Tio signifas, ke ĝis nun la elefanto tre diskrete dancis en la butiko de porcelanajoj. Sed la minaco plu daŭras. Oficiale, restas, ke Péchiney obtenis koncesion sur la teritorio de preskaŭ ĉiuj komunumoj de la Alpetoj. La listo de tiuj nomoj de la vilaĝoj sonas kvazaŭ litanio de la morto. La estonto restas nigra... por ne diri ruĝa ! Ĉar temas pri problemo, kiu amplekse transpasas la limojn de la Alpetoj : elekto de societo.

Temas nun, ĉu oni protektos ne nur la ĉirkaŭaĵon de Les Baux, sed la tutan verdan pulmon de Okcidenta Provenco. Ĉar Fos altiris centojn da homoj, inter ili estruloj kaj kadroj ĉiunivelaj, kies revo estas nesti en la naturo. Fatale aperas konstruistoj senskrupulaj, kaj tio okazis jam en la jaro 1973-a. Jen nia dua ekzemplo.

1973 : Nun alispecia rabobirdo flaris la profiton donotan de la proksimeco de Fos. Li celis enplanti novan urbon sur la deklivoj de Monto « Paon », apud Fontvieille. Temis pri tiu Schnebelen : pri li legeblis en la gazetaro, ĉar li antaŭ kelkaj jaroj provis, sed vane, deŝteli parton de la Nacia Parko de la Vanoise, por tie konstrui iun « urbaĉon » de la neĝoj. Germandialekte, Schnebelen signifas beketo. La Eta Beko posedis grandajn dentojn, por vori la pejzaĝon. Tie-ĉi li intencis glui sescent dometojn por modestaj monujoj, due, pli belajn por kadroj superaj, trie, hotelaron, komercan kaj turisman centron, kaj sportejojn. Ĉio sur areo protektita, ĉar jam enskribita en la Inventario de la Pejzaĝoj. En la faka jargono, tia mirindaĵo nomiĝas ZAC, Zono de Aranĝo kontrolita. Ĉu Fontvieille bezonas kaj deziras tiun zonon ? Ne. Sed Schnebelen, komence, sukcese delogis la urbestron kaj konsilantaron, logmontrante brilajn esperojn de riĉiĝo de la komunumo. Oni bone konas tiun muzikon : la melodio nomiĝas jen nova lernejo, banejo moderna, jen domo por la maljunuloj, ktp. Beketo triumfis. Li jam vidis la sescent kokinkaĝojn sur la deklivo, kaj la milionojn en sia poŝo.

Sed la unua batalado kontraŭ Péchiney estis hardinta la defendantojn. Post internacia kampanjo pere de la amasinformiloj, intervenoj apud la Ministro Poujade kaj la Prezidanto Pompidou murdis la rabobirdon en la ovo. En Januaro 1974, la Prezidanto de la Ligo kapablis deklari, ke « Schnebelen kuŝas inter la brasikoj », esprimo ne tre eleganta, certe ne internacia, sed ja bildoriĉa por priskribi la venkon.

Punkto, fino. Rezulto kuraĝiga, kaj signifoplena leciono. La misfarantoj ŝatas kaj utiligas la sekreton. Proklamante la faktojn, oni ĝenas kaj bremsas ilin. Tiel agadas Amnestio Internacia sur ankoraŭ pli urĝa kaj dolora kampo, tiu de la torturo kaj de la atencoj kontraŭ la homaj rajtoj en la tuta mondo. Nur trumpetante plejeble laŭte ni faligos la murojn de niaj modernaj Jerikoj.

Ekzistas multaj « Alpetoj » en nia mondo baraktanta. Indiferento maloportunas. Certe necesas uzinoj, minejoj, loĝejoj, sed ne ie ajn, iel aj, por ies ajn profito. Ĉiu devas viciĝi, ĉu inter la miopaj detruantoj, kiuj, cinike aŭ senkonscie, celas memmortigon kolektivan, ĉu inter la defendantoj de la estonto. Se detruemo pli rapidos ol protektemo, kian vojon ni laŭiros ? Vojon de neriparebla damaĝo. Sur tiu vojo, estas sojlo, trans kiu plu ne eblas returni.

« Lasciate ogni speranza, voi ch'entrate... »

« Ĉiun esperon lasu ĉe l'enpaŝo... ».

Danto certe ne imagis tiun modernigon de lia averto, kiam laŭ la tradicio li vagis apud les Baux tra la « Valo de Infero ». Tiun fatalan sojlon ni ankoraŭ ne atingis en la Alpetoj. La Ligo kaj ĝiaj amikoj tenas la grundon kun vigla atento. La lokaj estraroj, post ioma hezitado, ĝuste taksadis la miraĝan falsecon de la paktoloj promesitaj. Eĉ multaj fremduloj, akirinte bieneton, ne malprovencigas la Alpetojn. Ŝajnas, ke la loka etoso pli fortas : ĝi provencigas la novvenintojn ; sorĉitaj de ĝi, ili tiel enamiĝas, ke ili ofte iĝas la plej ardaj defendantoj !

Sume, kreskanta armeo, fronte al la monstraj kompleksoj, kiuj, tie, ne tiel fore, apud la marbordo, vualas la sunon, kaj verŝas sian insidan venenon. Armeo pacema, laŭleĝa. Ĉu sufiĉos argumentado kaj persvado ? Jam en la XVIII-a jarcento, Chamfort skribis pesimiste : « En Francujo, oni lasas en ripozo tiujn, kiuj ekbruligas la fajron, kaj oni persekutas tiujn, kiuj sonorigas la alarmon. » La registaroj, — kaj ni ĉiuj —, do atentu. Ili komprenu ĝustatempe, ke la vegetaĵa kaj ekologia organizo de la teritorio same gravas, kiel la planado priurba kaj industria ; same gravas, aŭ eĉ pli.

La verda koloro estas laŭmodo. Ĉu esperdone ? Ni esperantistoj jam delonge verdas. Sed kiom utilus verda internacia lingvo en mondo malverdiĝinta ?...

J.-P. BEAU.

ANONCO

La esperantista vojaĝoficejo « SUNO kaj MARO » (vidu « Heroldo de Esperanto » n. ro 11-12 de la 1.a de Septembro 1978, paĝo 8)

serĉas

esperantistojn loĝantajn en la ĉefurboj kaj en turismaj lokoj en Europo por organizi specialan mendo-kaj akceptoservon.

Ili devus disponi liberan tempon (gejunuloj, gepensuloj). Por tiu servo ili ricevos kompenson.

Skribu al SUNO kaj MARO, via San Maurilio, 7 — 20123 Milano (Italio) por pli multaj detaloj.

LA BRETONA LINGVO

Tiu temo estis prezentita en Angers en la kadro de la « 26 horoj de Esperanto » en 1975, kaj en Grésillon en la kadro de la Internacia periodo 1977.

Kial ni proponis tiun temon ?

Unue ĉar ĝi estas lingva temo, kaj ke tiaj temoj ne povas esti fremdaj al la Esperantistoj.

Due, ĉar nuntempe okazas revivigo de la minoritataj lingvoj kaj kulturoj.

Trie, la Esperanto-movado ne ignoras la problemojn de tiuj lingvoj, ofte minacataj ; UEA denuncis per rezolucioj la lingvajn diskriminaciojn kaj la lingvan genocidon.


Kvare, la aŭtoro banis, kaj ofte banas, en bretonparolanta medio, kaj liaj unuaj parolaj interŝanĝoj okazis en la bretona lingvo. Li ne estas fakulo pri la lingvo kaj la historio de Bretonio, kiujn oni neniam instruis al li en la lernejoj ; li volas esti nur informanto kaj atestanto.

F. Le Magadure.

La bretona lingvo apartenas al la kelta familio.

Antaŭ ol rigardi la lingvan flankon, estas necese iom konsideri la historion. En la 3-a jarcento antaŭ la kristana erao, Keltujo etendiĝis sur granda parto de Eŭropo, de Irlando ĝis Galatujo (en Malgranda Azio), de Skotlando ĝis Galegujo (nord-okcidenta angulo de la ibera duoninsulo). Ĝia civilizacio estis elstara rilate la agrikulturon, la industrion, la arton kaj la druidisman klerigon. Bedaŭrinde, restis malmute da spuroj pri la druida religio kaj filozofio, ĉar la transdono de la scio estis nur parola.

Iom post iom, en la daŭro de pluraj jarcentoj, la invadoj de la Romianoj kaj de la Ĝermanoj venkis la kavalirecajn Keltojn, la latina lingvo miksiĝis kun la kelta, krom en la malproksima okcidento. En la 7-a jarcento de nia erao, Keltujo kovris Irlandon, Skotlandon kaj la okcidentan parton de la Brita Insulo, Bretonion kaj la nord-okcidentan angulon de la ibera duoninsulo, nome Galegujon. De tiu tempo, ĝi ankoraŭ malvastiĝis, ĉefe en la sudokcidenta parto de la Brita Insulo, kie restas nur Kimrujo kaj Kornvalo, kiuj ne sin tuŝas ; sur la kontinento, Galegujo malaperis.



Nuna Keltujo

La kelta familio estas grava branĉo el la okcidenta branĉego de la hindoeŭropa trunko, kaj ĝi dividiĝas en du subbranĉoj kun tri branĉetoj por ĉiu. De la gaela subbranĉo venas la gaela el Skotlando, la gaela el insulo Mankso kaj tiu el Irlando, kiu fariĝis unu el la du oficialaj lingvoj de Irlanda Respubliko. La britona subbranĉo naskis la kimran lingvon, la kornikan aŭ kornvalan kaj la bretonan, kiu ĉefe interesas nin.

Rimarkinda estas la fakto, ke la sola kelta lingvo restanta sur la kontinento estas la bretona ; ĝi dividiĝas en 4 dialektoj : tri el ili multe similas unu al la alia, sed la kvara, nomata « vannetais », pli diferencas. Ĝi kovras la okcidentan parton de la departemento Morbihan kaj la limon kun Finistère.

Pri la malnova bretona lingvo

Oni scias malmulte, verŝajne pro la kelta tradicio kiu privilegias la rolon de la parolo. En latinaj manuskriptoj el abatejaj ĉartoj ekzistas bretonaj glosoj, familiaj kaj lokaj nomoj, teknikaj vortoj, kelkaj frazoj, sed, neniu kompleta verko estas trovebla antaŭ la 15-a jarcento. De tiam oni trovas kelkajn versojn, religiajn librojn pri la vivo de sanktuloj. Tio jam apartenas al la **meza** epoko de la lingvo, laŭ la specialistoj. Plej notinda estas la presado de dika vortaro bretona-franca-latina, en Bretonio mem, en Treguier, en la jaro 1499. Jehan Lagadeuc verkis ĝin kun la titolo « Catholicon » ; ĝi entenas ĉirkaŭ 5500 artikolojn. En la 16-a jarcento aperas diversaj tekstoj : teatraĵoj, meslibroj, katekismoj, religiaj kantoj...

La moderna bretona lingvo

datiĝas de la 17-a jarcento.

Pastro Maunoir, ankaŭ fama kiel misiisto, publikigis libron, kiu estas samtempe gramatiko kaj vortaro bretona-franca, kaj entenas katekismon en la bretona. Li simpligas la ortografion, kaj ĉiuj postaj aŭtoroj imitos lin. La rolo de la pastraro en tiu tempo estas diversmaniere taksita, sur lingva kampo kaj aliaj.

« En malbona lingvo, en « pastra lingvo », ili invitas la malriĉulojn meti sian nuran esperon en la transmondo. Tiu periodo, dum kiu la bretona lingvo **ne** estas malpermesita, estas la plej malbona en ĝia historio ; ĝi aliformiĝas, dialektiĝas, pligrandigas siajn kantonajn malsimilojn, ridindaj francismoj entrudiĝas. » (Morvan Lebesque).

En 1732, Pastro Grégoire, antaŭulo de la filologoj, publikigas vortaron francan-keltan ; en 1738 aperas lia gramatiko.

Komence de la 19-a jarcento, la rolo de Le Gonidec, « la patro de la vera bretona lingvo », estas grava ; li verkas gramatikon, vortaron, prilaboras la vorttrezoron kaj la ortografion, fondas Keltan Akademion, havas valorajn disĉiplojn.

Aparte menciinda estas la rolo de la **kolektistoj-folkloristoj,** kiuj surpaperigis amkantojn, prieventajn kantojn, rakontojn... La unua el ili, Hersart de la Villemarque, aperigis, en 1838, « Barzaz Breiz » aŭ « Popularaj kantoj el Bretonio » ; li kolektis en ĉiuj regionoj de Bretonio. Ankaŭ F.M. Luzel, arkivisto en Quimper, sin dediĉis dum pluraj jardekoj al tiu kolektado. La sukceso de Barzaz-Breiz kuraĝigis multajn homojn kaj estigis florantan literaturan ondon. Brizeux, kiu ĉefe verkis en la franca, ankaŭ verkas en sia unua lingvo. Poemoj, prozaĵoj, teatraĵoj aperas. Beletraj grupoj formiĝas kaj ili renaskas la bardajn tradiciojn. Ankaŭ revuoj fondiĝas.

Pli ol anekdote menciinda estas la nomo de Charle De Gaulle, « Barz Bro C'hall » (bardo de la franca

lando), praonklo de Generalo De Gaulle ; li ne estis Bretono sed li lernis la lingvon kaj propagandis, sensukcese, por la instruado de la bretona lingvo en la bretonaj lernejoj.

Aliaj homoj, interalie Anatole Le Braz kaj Charles Le Goffic interesiĝas pri sia provinco, verkas pri ĝi, sed france. Anatole Le Braz, profesoro en Quimper kaj en la beletra fakultato de Rennes, konsilas la rektan kolektadon de la riĉaĵoj kaj helpas al F. M. Luzel. Liaj plej famaj verkoj estas La kanto de Bretonio, La legendo de la morto, reeldonita plurfoje, Eseo pri la historio de la kelta teatro.

Kun granda plezuro mi prononcas la nomojn de Jan Ber Calloc'h kaj Loeiz Herrieu, miaj du samdialektanoj, kies nomoj estas nedisigeblaj.

Jan Ber Calloc'h (1888-1917), la kristana poeto, naskiĝis sur la insulo Groix. « Me zo ganet é kreiz er mor » (mi naskiĝis meze de la maro), li skribas en sia plej fama poemaro « Ar en deulin » (Surgenue). Bedaŭrinde, la unua mondmilito subite ĉesigis lian vivon.

Loeiz Herrieu (1879-1953), la bardo-kamparano, kiu longe vivis en vilaĝo apud Hennebont, fondis, en 1905, la revuon « Dihunamb », (Ni vekiĝu !) — nia esperantogrupo nomiĝas « Vekiĝu ! » —, en kiu aperis multaj poezioj de J.-B. Calloc'h. Inter 1905 kaj 1944 aperis 395 numeroj de tiu revuo, kies ĉefredaktoro kaj eldonanto estis L. Herrieu, kiu samtempe ĉiam zorgis pri sia farmo. Neĉesinte esti kamparano, L. Herrieu atingis veran klerecon kaj « anstataŭ ol laŭdegi malfacilan idealon, li travivis ĝin ». (Jean La Bénelais, en Galerie Bretonne). Li kolektis kantojn, verkis poeziojn, rakontojn, teatraĵojn, milito-taglibron, « Kamdro en Ankeu » (Vojkurbiĝo de la morto), Historion de la bretona literaturo... Liaj poezioj konsistigas du volumojn : « Sonnenneu er labourer douar » (Kantoj de la terkulturisto) kaj « Dasson ur galon » (Resonadoj de koro).

Ni citu ankaŭ Emile Masson (1861-1923), kiu, instruisto pri angla lingvo en Pontivy, fondis la revuon Brug (Erikoj) celantan instrui la socialismon.

Post la nomo de Tanguy Malmanche, dramverkisto, estus citindaj almenaŭ dudeko da aliaj homoj, kiuj bretone verkis valorajn poeziojn aŭ romanojn aŭ teatraĵojn. Unu elstariĝas : Roparz Hémon.

En 1925, Roparz Hémon (1900-1978) fondas la revuon « Gwalarn » (nord-okcidento) kaj instigas gravan literaturan kaj lingvistikan movadon. En lia revuo, instruistoj, junaj verkistoj prenas sur sin la defendon kaj la renesancon de la bretona lingvo. Ili tradukas malnovajn keltajn tekstojn, ĉefverkojn el aliaj lingvoj, verkas mem romanojn, poemojn, dramojn, lernolibrojn, vortarojn. Bedaŭrinde, la milito haltigos tiun senkomparan realigon, kiu restas preskaŭ nekonata de la Francoj. Mi denove citas Morvan Lebesque : « Tridek jarojn poste, tiu evento, kiu okazis nur je kvarcent kilometroj de Paris, kiu interesis specialistojn pri kulturoj en tuta Eŭropo, kiu naskis tezotemojn eĉ en Usono, restas nekonata en Francujo, nekonata de la registaroj, de la kulturaj organizoj, de la francaj partioj, dekstraj kaj maldekstraj, de ĉiuj Francoj, ĵurnalistoj, eseistoj, publiko, kiuj pasiiĝas por la « kulturo ». En tiu ondego, menciindaj estas la nomoj de Yann Fouere, kiu fondis en 1934 la asocion « Ar brezoneg er skol » (la bretona lingvo en la lernejo), kaj tiu de Yann Sohier, fondinto de la movado « Ar Falz » (la falĉilo). Ĉi tiu movado ankoraŭ ekzistas kaj arigas instruistojn el la publikaj lernejoj ; ĝi organizas staĝojn, eldonas revuon kaj librojn.

Post la dua mondmilito.

La milito- kaj precipe la post-milito estis tre malbonaj periodoj por la bretona lingvo, ĉar politikaj konsideroj aldoniĝis al la aliaj, akrigis la diferencojn, la malamikecojn, kaj la bretonismo kvazaŭ kaŝe kaj honte malaperis. Joseph Chardronnet kaj Morvan Lebesque akordiĝas pri tio, kvankam ili ne havas la saman politikan horizonton.

« Je la momento de la liberigado, la tuta strukturo bretona, kultura aŭ ne, estas dispecigita : la plej agemaj homoj estas en karcero. La aliaj, eĉ eksrezistadantoj, estas pli ol singardemaj kaj ne plu kuraĝas montri siajn poziciojn kaj siajn ideojn ». (J. Chardonnet).

« Je la epoko de la liberigado, iu ajn bretonismo iĝis suspekta, kaj oni enkarcerigis, en 1944, homojn, kies nura krimo konsistis en posedo de bretona biblioteko.» (M. Lebesque).

Ĉirkaŭ la jaroj 1950, oni reaŭdas, tie kaj tie, bretonan muzikon kaj oni redancas bretonajn dancojn. Kulturaj asocioj daŭrigas sian agadon kun novaj respondeculoj, ekzemple « Bleun Brug » (erikofloro) kaj « Ar Falz », jam menciita. Pli kaj pli, la ekonomiaj malfacilaĵoj kaj la manifestacioj, kiujn ili kaŭzas, influas kaj akcelas la bretonan movadon ; por parto de la loĝantaro, la ekonomio, la politiko, la lingvo, la kulturo... estas nur diversaj flankoj de la sama problemo : la bretona problemo. Ĉio ĉi miksiĝas en la kantoj kaj poemoj de la novaj aŭtoroj, kiel Youenn Gwernig, Glenmor, Paol Keineg kaj aliaj. Eble tiu fakto estas unu el la kaŭzoj de la grandega sukceso de la libro de Per Jakez Helias « Le cheval d'orgueil » (La fieroĉevalo). La alvokoj eksplodas : « Nia lingvo », « Laboro en la hejmlando ».

Komentoj pri la situacio de la lingvo.

Pluraj gravaj lingvoj nun parolataj en Eŭropo plenkreskiĝis en la epoko, dum kiu Bretonio baraktis por defendi siajn rajtojn kontraŭ la francaj reĝoj, kiuj ne emis respekti la kontrakton de 1532. Ni jam aludis pri la rolo de parto de la ekleziaro, kaj administristaro, por francigi la Bretonojn. Ni devas aldoni la mizerojn kaj militojn, kiuj kaŭzis multajn suferojn en la 16-a kaj 17-a jarcentoj. Senĉese daŭris la klopodoj « por inside senpersonigi Bretonion « (Philippe Durand).

Oficialaj batoj kontraŭstaris normalan uzadon de la lingvo. Dum la dua duono de la 16-a jarcento kaj ankaŭ en la 18-a kaj 19-a sin sekvas malpermesoj kontraŭ la teatraj prezentadoj. De la 19-a la lingvo mem estas atakata. En 1831, la prefektoj de la departementoj Finistère kaj Côtes-du-Nord skribas al la ministro, ke « per ĉiuj rimedoj, oni devas helpi al la malriĉigo, la koruptado de la bretona lingvo, por ke de unu komunumo al la alia oni ne plu povu sin kompreni. Oni devas absolute detrui la bretonan lingvon ». En la sama epoko, subprefekto Romieu proponis : « Ni kreu, por la plibonigado de la bretona raso, tiajn premiojn, kiaj ni rezervas al la ĉevaloj, kaj agu, por ke la ekleziaro helpu nin, akceptante doni la unuan komunion nur al la infanoj parolantaj la francan lingvon. »

La malestimo al la barbara lingvo kaj al la barbaroj, kiuj uzas ĝin, daŭras longe. En 1925, ministro de la publika instruado, De Monzie, deklaras : « Por la lingva unuiĝo de Francujo, la bretona lingvo devas malaperi ». En 1920, akademia inspektoro volis kunlabori al la verkado de dulingva lernolibro : oni alipostenigis lin.

Ĝis la dua mondmilito la lingvo devas resti ĉe la pordo de la lernejo kaj la instruistaro ofte uzis la abomenindan sistemon de la « simbolo », t.e. monero aŭ alia objekto, kiun oni pune donis al infano, kiu senpripense eldiris kelkajn bretonajn vortojn. Tiu provis transdoni ĝin al alia ne sufiĉe singardema. Je la fino de la tago, la lasta posedanto de la simbolo ricevis punojn. Mi konis tion.

Sen instruado de la lingvo, sen la rajto libere paroli ĝin, estas facile kompreneble, ke ĝi iom post iom malriĉiĝas, kripliĝas. Aliflanke, provante instrui la francan, ne parolatan hejme, forvišante la sciojn de la infanoj, do apogiĝante sur neniu bazo, la instruistoj atingas nur mi-

zerajn rezultojn. Tiu grava pedagogia eraro daŭris jardekojn, je la granda damaĝo de pluraj generacioj. En tiaj kondiĉoj, oni ne miru, ke okazis miksaĵoj, misuzoj por fine alveni al du lingvaĉoj. Vi povas mem imagi la psikologiajn suferojn de homoj tiel traktitaj kaj trafitaj.

Des pli grandaj estas la meritoj de tiuj, kiuj, kontraŭ ĉio daŭre praktikis la lingvon kaj savis ĝin. Morvan Lebesque esprimas tion per trafaj formuloj : « La registaro malinstruas la lingvon, tiuj pilgrimantoj reinstruas ĝin. Ĝi malpermesas ĝin, ili ĝin disvastigas... Mirakle, ĉiunokte iu venis kaj refajrigis la cindrojn. Ili savis sian lingvon, tiuj vortokolektantoj ».

Kaj hodiaŭ ?

En mia regiono la lingvo estas ankoraŭ parolata de homoj naskiĝintaj antaŭ la dua milito ; sur la kamparo. Sed iliaj infanoj malofte parolas ĝin. En la urbo oni ne esprimas sin en la bretona, plej ofte pro nescio, aŭ ĉar ĉe la scipovantoj eble restas iom de la honto trudita antaŭe. Tamen, la timida oficialigo de la bretona en duagradaj lernejoj kaj en la universitatoj de Rennes kaj Brest kontribuas al la interesiĝo de junuloj kaj studentoj ĉiam pli multaj. Kun la furoro de la muziko kaj de la dancoj praktikataj en la noktofestoj, ĉu tio estos pli ol modo ? Jen ekzemplo, kiu helpos vin respondi laŭ via temperamento : En Lorient de pluraj jaroj, ekzistas printempa Kantfestivalo kaj somera Kornemuzofestivalo ; ĉijare al ĉi lasta aldoniĝas Bretona Universitato.

En 1975 la Regiona Konsilio, oficiala organizo, unuanime aprobis la kreadon de Regiona Kultura Instituto de Bretonio, kies celoj estas esplorado kaj disvastigo de la kulturo, bona uzo de la heredaĵo, kultura kreado.

« Emgleo Breiz », unuiĝo de pluraj asocioj, siaflanke agadas ĉiudirekten por pligrandigi la lokon de la lingvo en la lernejoj, en la informrimedoj kaj en la publika vivo, por plibonigi la kulturajn rimedojn, por ke estu decidita regiona reformo demokrata, kiu ebligos al la Bretonoj mem administri siajn aferojn. Ĝi agadas ankaŭ en la sino de la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj.

En unuagradaj lernejoj la lingvo ne havas lokon. En la duagradaj ĝi estas fakultativa, la lernantoj povas elekti provon pri ĝi por la bakalaŭra ekzameno (pli ol 12 000 en 1972) sed... mankas profesoroj — nenio estas antaŭvidita por formi ilin — ... aŭ mankas mono por pagi la ekzistantajn. Emgleo Breiz, en julio 78, taksas je 2000 horoj la minimumon de la necesa instruhoro, sed la administracio intencas pagi nur 470 !

En la universitatoj ekzistas elektebleco « kelta », kiel dua vivanta lingvo por la licencioj pri vivantaj lingvoj kaj moderna beletro, sed ne ekzistas la grado « licencio pri kelta lingvo », nek pri la bretona kompreneble.

Nuntempe okazas kelkaj provoj por malfermi bublernejojn, en kiuj la bretona estos plene uzata.

Esperanto kaj la bretona lingvo.

Laŭ mia scio, malmultaj rilatoj ekzistas inter ambaŭ. La fondinto de la revuo Gwalarn, Roparz Hémon, estas la aŭtoro de vortareto bretona-esperanta kaj esperanta-bretona ; ĝi ne plu estas trovebla. Leginto de Gwalarn diris al mi en Angers, ke en ĉiu numero de la revuo aperis artikolo en Esperanto. En 1929, Roparz Hémon verkis ankaŭ « Esploro pri la situacio de la bretona lingvo » - n. Tio estas menciita en « Esperanto en Perspektivo », paĝo 223.

Ĉijare aperis sub la formo de 3 libretoj « Deskomp Esperanteg » (Ni lernu Esperanton), de Erwann Ar Menga. La unua estas lerno-libro, la dua kaj la tria estas vortaretoj. La eldonisto estas la asocio « Hor Yezh » (nia lingvo). En la bretonlingva antaŭparolo, Per Denez, profesoro pri keltaj lingvoj en la Universitato de Rennes, skribas : « Setu aman eta al levrig kentan en ur rummad a vo, spi am eus, hir. » (Jen la unua libreto el listo, kiun mi esperas longa).

Iama samurbano mia, Joseph Mariette (li trapasis la Ateston pri Kapableco en la jaro 1907 !) skribis en la Numero 24 (aprilo 1954) de « Ora Ulekso » : « Mi tute ne intencas kontraŭbatali nian lingvon, mi men ŝatas nian literaturon, niajn kantojn kaj posedas sufiĉe riĉan bibliotekon bretonan. Sed oni devas konfesi kio ne estas neigebla. Kiel ĉiu homa kreaĵo, la bretona lingvo, naskiĝis, vivadas, kaj mortos pli aŭ malpli prokraste.

Ĉu ne estas Renan, kiu diris : « La Bretonoj emas defendi celadojn antaŭe perditajn ! »

Jen kial iuj el, niaj samlandanoj propagandas por vigligi nian agoniantan lingvon. Ili certe havas por tio pravajn argumentojn. Nia esperanta movado multe pli progresadus se oni tiel klopodus kiel por la bretona, kiu estas kondamnata. »

De almenaŭ du jardekoj multe kreskis la intereso pri la lingvo, la kulturo kaj la historio bretonaj. Do, ni prefere fidu tion, kion skribas Per Denez en 1978. Io estas certa : restas multe da farenda laboro por la disvastigantoj de la bretona heredaĵo, kaj ankoraŭ multege pli por tiuj, kiuj emos konigi ĝin ekstere per Esperanto !

Noto pri Roparz Hémon :

La gazetoj raportis mallonge pri lia morto okazinta en julio 1978 en Dublin, kien li elmigris post la dua mondmilito.

Bibliografio pri la historio de la lingvo kaj de ĝia literaturo.

En la franca :

Le livre d'or de la Bretagne, de Philippe Durand. Ed. Seghers.

Le breton langue celtique, de Yann Brekelien. Ed. Nature et Bretagne, Quimper.

Langue et littérature bretonnes, de Francis Gourvil. Kolekto « Que sais-je ? », n° 527.

Comment peut-on être Breton ? (Kiel eblas estis Bretono ? Eseo pri la franca demokratio) de Morvan Lebesque. Ed. Seuil.

Pour la langue, la culture et les libertés bretonnes. Ed. Emgleo Breiz. Brest.

L'enseignement des langues régionales, de J.-B. Marcellesi. Ed. Larousse, kolekto « Langue franĉaise ».

Esperanta-bretona :

Deskomp esperanteg, de Erwann ar Menga. Ed. Hor Yezh (Per Denez. Ri, Ploare. 29100 Douarnenez).

Por tiuj, kiuj deziras legi pri la historio de Bretonio :

Histoire de la Bretagne, de Joseph Chardronnet. Nouvelles Editions latines. 1964.

Histoire de la Bretagne, de Yann Brekilien. Ed. Hachette. 1977.

Histoire secrête de la Bretagne, de Jean Markale. Ed. Albin Michel, 1977.

Fine jen kelkaj titoloj de libroj dulingvaj, bretonaj-francaj : Barzaz Breiz, de Hersart de la Villemarqué (Popularai bretonaj rakontoj). Librairie académique Perrin.

Ar en deulin (Surgenue) de J.-P. Calloc'h. Ed. Kendalc'h. Dasson ur galon (Resonadoj de koro) de Loeiz Herrieu. Ed. Dihunamb.

DU JAPANAJ RAKONTOJ

(EL LA FOLKLORO DE CUGARU-DISTRIKTO)

LA MILIONULO

Estis serena tago en aŭtuno ; super la urbo elstaris alte lŭaki-monto, kiu estis kolorigita per flava, ruĝa — aŭtuna koloro.

« Teo, teo, ĉu vi ne bezonas teon ? — kaj kombilon, ornamharpinglon, pudron, ruĝigilon ? » La teo-kolportisto Ĉaŭro tiel kriadis tra la stratoj. Sed pro kio ? Nenia varo vendiĝis en tiu tago. « Mi forlasu la urbon, kaj iru al la vilaĝo », li pensis. Sur la vojo al la vilaĝo, hazarde li venis al vasta kampo.

La aŭtuna suno rapide falis en la monton kaj krepusko fariĝis pli kaj pli malluma. Ĉaŭro laciĝis, li delasis la varojn sur la teron kaj eksidis sur stumpon. Vespere vento susurigis velkintajn herbojn, momente lin tremigis ; tiam, lumon li vidis malproksime. « Ha, lumo, certe el domo. » Li ekpaŝis ree en la direkton al la lumo. Tie staris domo kun pordego.

Li frapis la pordon — aperis el la domo juna virino ; vidi tian aspekton li ne kutimis en la areo. « Mi estas teo-kolportisto, mi perdis la vojon al la vilaĝo. Mi vin petegas, mi volas tranokti en angulo de via domo, se tio vin ne tro ĝenos. » « Via peto bezonas ies aprobon. » Ŝi malaperis internen de la domo. Baldaŭ ŝi ree aperis kaj diris : « Eniru bonvole. » Ĉe la pordo-kadro ŝi lavis liajn piedojn, kaj viŝis ilin per tuko, poste kondukis lin al la akceptejo. « Estas mirinde ». Ĉaŭro pensis, « ke tia granda domo sole staras meze de la vasta kampo. »

Al li ŝajnis, ke la domo estas tre spacoplena. Aperis antaŭ li ĉirkaŭ dek kvin junaj virinoj, kiuj surhavas kimonon kun longaj manikoj kaj ili ovaciis lin vokante : « Mastro, mastro ! » Ili aĉetis la tutan varon, kiun li havas kaj regalis lin alportante unu post la alia frandajojn, kiujn li ankoraŭ neniam manĝis. En la sekvanta tago iu virino, kiu ŝajnas ilia patrino, venis al li kaj diris: « Estu ĉe ni bonvena gasto, mastro, vi povas tranokti senĝene kaj ripoze en nia domo ankaŭ hodiaŭ kaj morgaŭ. Kiel vi vidas, en nia domo vivas nur virinoj. Ĉu vi ne dezirus edziĝi al unu el miaj filinoj, kaj aliĝi al nia familio ? »

Aŭskultinte la persvadon de ŝi, li tre ĝojis, ĉar Ĉaŭro estis fraŭlo kaj malriĉa. Li sekvis ŝin, t.e. li edziĝis al la filino, kiu lavis liajn piedojn kaj aliĝis al la familio. La feliĉaj tagoj daŭris...

Intertempe, forpasis aŭtuno, vintro kaj venis printempo varma kaj amuza.

En iu tago, kiam floroj de ĉiuj arboj estis en plena florado, la patrino, la familiestro, alvokis lin al ŝi kaj diris : « Mia filo, hodiaŭ estas beia tago, do, mi volas eliri kun ĉiuj miaj filinoj por admiri florojn de umearboj (speco de abrikoto). Mi petas, ke vi estu domzorganto dum nia foresto. » Ĉaŭro volonte akceptis ŝian peton. La filinoj urĝeme preparis kaj plenigis lakitajn kestetojn per bongustaĵoj. Ĉiu filino aranĝis sian hararon en « ŝimada » hararanĝo, vestiĝis per kimono kun longaj manikoj havantaj bildon de ume-floroj kaj metis sur siajn piedojn altetajn klak-getaojn (malsupre kavigitaj getaoj). La filinoj eliris el la domo sonigante klakadon de la getaoj. Kiam ĉiuj estis ekirontaj, la patrino haltis kaj sin turnante al Ĉaŭro, diris : « Mia filo, vi enuos dum nia foresto, do, vi povos malfermi la pordojn de niaj tenejoj. » Lastmomente, kvazaŭ ŝi ion rememoris, ŝi aldonis : « Tie staras dek du tenejoj kaj vi povos vidi ilin ĝis la dek unua, sed neniam malfermu la dek duan, mi petas. » Kaj ili en la paradaj vestaĵoj ekiris. Ĉaŭro estis forlasita en la spacplena domo. Baldaŭ li sentis sin soleca, poste oscedadis kaj kun enua mieno li ekstaris por preni la ŝlosilaron, kiun la bopatrino postlasis. Ĉiu tenejo havis grandan seruron. En la unua li vidis monton da rizo. En la dua misoon (fermentita densa pasto el sojfaboj kaj salo), kiu plenigis la tenejon. En la tria sukeron, en la kvara kotonan ŝtofon, en la kvina salon. Ĉaŭro trovis fluantan rivereton inter la kvina kaj la sesa, kaj li vidis svarmon da naĝantaj karpoj en la rivereto. Tiamaniere, unu post la alia li vidis la internon de ĉiu tenejo, kaj venis al la dek unua ; tie li rigardis monton da arĝentblokoj. « Ha, mi estas surprizita. Kiaj riĉuloj ili estas ! Ĝis nun mi ne vidis eĉ manplenon da arĝenteroj. Ili povus akapari la tutan teon en Japanio. » Li fermis la pordon de la dek unua, kaj staris antaŭ la pordo de la dek dua. « Kio aperos ? Kio min surprizos ? Eble, mi rigardos brilan monton da kobanoj (elipeaj plat-ormoneroj) en la dek dua, — sed, bopatrino avertis min « neniam malfermu. » Li enpensiĝis — kaj trovis pretekston. « Mi estas ano de la familio, kiel la aliaj, ankaŭ mi rajtas enrigardi la monton da « kobanoj », — feliĉe neniu restas krom mi en la domo. » La granda seruro de la dek dua estis tute rustita ; kvankam li povis enpuŝi la ŝlosilon en trueton, li ne povis turni. Tial li enverŝis sezamoleon en la trueton, poste li povis turni la ŝlosilon kaj forigi la rustitan seruron. Due, la ŝovebla pordo ne facile moviĝis. Dank' al la sezamoleo, fine li povis malfermi la pordon — sed, tute malplena estis la interno, nenio troviĝis. « Ho, kion mi vidas ! » Nur fenestreto sur la kontraŭa muro troviĝis. Timeme, nur iomete li malfermis la fenestreton, kaj elrigardis eksteren. Floroj de umeoj en la plena florado, — kiom oni povas vidi ! La branĉoj de la umearboj estis plenaj je ugvisoj, kiuj aŭ kantis aŭ flugetis de branĉoj al branĉoj. Iom malproksime vidiĝis malgranda altaĵo, sur kiu sidis en ringo aro da virinoj vestitaj per kimonoj kun longaj manikoj. Ĉaŭro ekkriis mallaŭte: « Ĉu ili ? » Por ĝuste rigardi li plene malfermis la fenestreton. Momente, la ugvisoj ĉesis kanti kaj flugeti, tiam, ĉiuj virinoj rigardis fikse ĉi direkton — la fenestreton. Subite, ĉiuj ugvisoj samtempe flugis for kun tondra bruego, kaj la figuroj de la virinoj malaperis kiel nebulo. Same malaperis — la tenejoj, domo, pordego — ĉio. Nur Ĉaŭro gape staris sola kun la varoj meze en la vasta kampo kovrita per velkintaj herboj.

Tradukis kaj kompilis ZIN Kiyosi.

TIGRINO KAJ OGROKATO

En la urbeto, kiu rigardas al granda maro, loĝis du fratinoj. La trajtoj de la pli aĝa estis strangaj, t.e. ŝi havis larĝajn akrajn okulojn, larĝan buŝon kaj la vizaĝkoloro estis nigre-bruna kiel argil-idolo elterigita. Plie ŝi havis sangvinan temperamenton, kaj neniu povis timigi ŝin. Do, oni nomis ŝin Tigrino. Malgraŭ tia moknomo ŝi estis bonkora kaj servema al la maljunulinoj en la urbeto. Ŝi estis fiŝisto,ŝi povis pli lerte kapti fiŝojn per kvarbranĉa harpuneto ol viraj fiŝistoj. Dume, la pli juna fratino estis ĝentila, milda kaj pala knabino ; ĉiam sidante ŝi nur kudrolaboradis hejme.

Iam, en ilian domon, senhejma kato nigra eniris arbitre kaj loĝadis, kvazaŭ la domo estus ĝia propra. La kato fariĝis tiel granda kiel hundeto, eble pro tio, ke ĝi manĝis multe da fiŝaĵo ĉiutage. Sed la kato estis tro satigita de fiŝaĵo ; ĝi ofte kaptis kokinojn kaj manĝis ilin anstataŭ la fiŝaĵon. Post monatoj ree ĝi estis tro satigita de la kokaĵo. Fine, ĝi nur morde tranĉis kolojn de kokinoj unu post la alia. Kompreneble, la najbaro, kiu bredis la kokinojn, plendis pri tio kontraŭ la fratinoj. Ĉiam, kiam la pli juna fratino aŭdis la plendon de la najbaro, ŝi nur petis pardonon per tremanta voĉo. Vespere, Tigrino aŭdinte tion rapidmove kaptis la nukon de la kato kaj ĵetegis ĝin sur senplankan parton. « Gjaŭo ! » la kato kriaĉis ; post momento ĝi povis apenaŭ stari per tri piedoj.

La kato estis ofte ĵetegita ; pro tio, tuj kiam Tigrino revenis hejmen, ĝi timeme forkuris el la domo, kaj en la sekvanta tago ĝi ŝtelmove reeniris.

Iun tagon la fratino kudrolaboris sidante apud la fajrejo en la kuirejo. La kato komforte dormetadis kaŭre apud ŝi. Ĉio estis tute kvieta kaj nenia sono estis aŭdebla krom la ŝpinado de la kato. Tiam, la kato vekiĝis

kaj ĉirkaŭrigardis per la du grandaj okuloj, kvazau ĝi ion ekpensis. « Filineto », alparolis la kato per la homa lingvo. La fratino konsterniĝis kaj paliĝis, ŝi respondis per tremanta voĉo : « Kio ? » « Vi estas soleca en la tago, mi prezentu al vi la dancon lernitan. » Dirinte tion, la kato saltis sur la komodon kaj alportis mantukon kun punktita desegnaĵo. Ĝi kovris sian kapon per la tuko, ekstaris sur la postaj kruroj kaj ekdancis kantante :

« Ne min plu insultu, nomante min Kataĉo.
Kataĉo povas surmeti getaojn sur du piedoj.
Kataĉo povas apogi sin sur promenbastono.
Kataĉo povas sinvesti per tinkturita banvesto.
Miaŭ, miaŭ, njago, njan ! »

Tiel dancis kaj kantis la kato. « Ĉu la danco vin amuzis ? Mi dancu ankoraŭfoje. » Denove la kato dancis. Fininte la dancon, la kato deprenis la mantukon de sur la kapo kaj ĝin faldis kaj ree metis sur la komodon. « Filineto, vi ne parolu al Tigrino pri mia danco ! Se vi parolos, mi vin mortigos, nepre ! » Poste kiel antaŭe ĝi komencis dormetadi apud la fajrejo. Vespere, Tigrino revenis hejmen ; vidante la mienon de ŝia fratino, ŝi demandis : « Kial vi tiel paliĝas ? Ĉu vi estas malsana ? » Sed la fratino nenion respondis, kaj pli frue enlitiĝis. Tigrino maltrankvile demandis kelke da fojoj, sed ŝi kiel antaŭe neniel parolis pri la kaŭzo. Malgraŭ ke la nokto malfruiĝis, ŝiaj okuloj restis malfermitaj. « Ĉu kato estas dome ? » fine la fratino diris, « vole serĉu ĝin. » Tigrino ellitiĝis kaj serĉis la katon. « Nenie troviĝas Kataĉo. Denove la aĉulo mortigis kokinojn ? » Ŝi skuis la kapon kaj per tremanta voĉo ekparolis pri la afero. « Kato mortigos min nepre », ŝi malĝoje ploris. Tigrino ekkoleris, koleregis. « Mi eltiru la kapon el ĝia korpo morgaŭ », ŝi laŭte kriis.

En la sekvanta mateno Tigrino serĉis la katon en kaj ĉirkaŭ la domo kaj tra la urbeto, sed ne povis ĝin trovi. Tial, ŝi najlis ĉiujn fenestrojn kaj pordojn, laste la trairejon ekster la domo. Vespere, Tigrino pli frue revenis hejmen. Ŝi frapis la pordon, frapadis, sed nenio estis aŭdebla. Rapide ŝi malnajlis kaj enpaŝis en la domon — tie trovis Tigrino ŝian kapon morde tranĉitan for de la korpo.

Norde de la urbeto malproksime, troviĝis la lago. La lago estis bona ŝiphaltejo, ĉar la aperturo de la lago malfermiĝis al la granda maro. Sur la monteto, kiu frontis kontraŭ la lago, staris granda malnova templo budhisma. Antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj, iu velŝipo ŝarĝita per granda sonorilo por la templo, eniris en la lagon. Antaŭ la elŝipiĝo, la ŝipo renversiĝis pro ventopuŝo, kaj la granda sonorilo subakviĝis profunden. Rilate al tio, mirinda afero okazis lastatempe ; kiam la suno subiris en la senliman maron kaj la lago fariĝis mallumeta, tiam, io eksonoris el la fundo de la lago. La sonon reeĥis montetoj, kiuj ĉirkaŭas la lagon. Ĉiam, kiam io sonoris, la loĝantoj estis timigitaj kaj voĉojn mallaŭtigante priparolis unu la alian pri tio, ke baldaŭ io malbona okazos ĉirkaŭ la lago. Certe, io okazis ; depost tiu tempo la pastro kaj akolitoj neniam vizitis la vilaĝanojn. « Ĉu ili ĉiuj malsaniĝas ? » « Estas strange, ke ĉiuj malsaniĝas. » « Eble, ili manĝis venenajn fungojn. » Do, kelkaj vilaĝanoj vizitis la templon. Sed la figurojn de la pastro kaj akolitoj ili ne povis trovi. « Kien ili iris ? » « Kial ili forlasis la templon ? » Nur staris en la ĉeftemplo la statuoj de Budho kaj Dek ses Araĥanoj (budhismaj sanktuloj).

Laŭ la sciigo de la vilaĝanoj, tri feŭduloj portantaj du glavojn ĉe la flanko venis al la vilaĝo por esplori la aferon. Vespere, la sonorado vere aŭdiĝis el la fundo de la lago, kiel la denunco. La feŭduloj estis mirigitaj, sed ŝajnigante bravuloj, ili ekiris kun kelkaj vilaĝanoj al la templo. Jam fariĝis nokto, sed neniu revenis el la templo, ankaŭ en la sekvanta tago. Poste, neniu vilaĝano proksimiĝis al la templo, neniu feŭdulo vizitis la vilaĝon.

Estis frua aŭtuno, ĉiumatene fiŝistoj rigarde esploris la aspekton de la ĉielo. Malgraŭ tia malbona vetero Tigrino fiŝadis marmeze. Maso da nigraj nuboj rapide etendiĝis de sudo al nordo kaj baldaŭ kovris la tutan ĉielon. « Ventego ! » ŝi mallaŭte eldiris.

Ŝi remis kaj remis celante la teron, sed forto de la ventego superis tiun de Tigrino. La ŝipeto estis forportata norden kaj norden. Sed ŝi estis tute trankvila, ĉar tia akcidento okazis pli ol unu fojon en du aŭ tri jaroj. De la urbeto, en kiu Tigrino loĝis, al la aperturo de la lago, marborda linio rekte kuris. Sur la rekta marborda linio (ĉirkaŭ 35 km) oni ne trovis ian ajn rifuĝejon. Pro tio, oni kutime rifuĝis en la lagon, kiam ŝipo estis norden forportata. Ankaŭ ŝi, kiam la ventego iom kvietiĝis, rapide fuĝis al la lago.

Tigrino ripozis en kabano konstruita sur la lagbordo kaj aŭdis de iu vilaĝano la strangan rakonton. « Kiam la sonorilo sonoras, tiam miaj haroj hirtiĝas », parolis li. « Kredeble, la feŭduloj kaj vilaĝanoj estis mortigitaj de aro da banditoj ; sed — ĉu oni povas sonorigi la sonorilon sur la lagfundo ? » ŝi enpensiĝis. « Baldaŭ vi povos aŭdi la sonoradon », la vilaĝano diris. Ŝi atendis la vesperiĝon. Jam la ventego kvietiĝis kaj la nebrile ruĝa maso estis subakviĝonta en la okcidentan maron. Sur la monteto la templo lumigata de nebrila lumo, klare vidiĝis. Baldaŭ, ĉio fariĝis nebula kaj mallumeta. Sonoris, sonoregis el la fundo de la lago. « Terure, terure por aŭdi ! » li ŝtopis la orelojn per montraj fingroj tremante per la tuta korpo. La sonorado sonoris nur unu fojon, sed la eĥo restadis longe, longe super la lago. « Ho, terure ! » ree li kriis, jam ne tremante. Tigrino kun aplombo demandis al li : « Kial terure ? — nur sonoris. » Nenion li respondis, nur rigardadis ŝin per larĝe malfermitaj okuloj. Ŝi ekstaris kaj ekpaŝis malrapide en la direkton al la templo. Sur la vojo kelkaj vilaĝanoj ŝin vokis por haltigi. « Kien vi volas iri ? » Nenion respondante ŝi nur ridetis, sed ŝiaj okuloj pli akre radiis.

La templo estis granda kaj malnova, sed ne tro ruiniĝinta. En la ĉeftemplo fronte al la portalo Budho sidis kaj malantaŭe staris Dek ses Araĥanoj kun diversaj trajtoj sur la alta podio. Vespere, apenaŭ sonoris la subakviĝinta sonorilo, ekaperis bluaj bruloj kiuj lumigis la sanktulojn ; tiam, ili abrupte malfermis la okulojn larĝe, kaj ekmoviĝis. Post momento, ili iris malsupren per ŝtuparo al la planko. Budho sidis apud la granda ligna tamtamo kaj prenante frapilon ekfrapis ĝin ; samtempe, Dek ses Araĥanoj ekdancis en ringo ĉirkaŭ Budho. Ili kantis :

« Ho, ĥaj. Ho, ĥaj. Ho, ĥaj ? Ho !
Dek ses Araĥanoj nun estas dancantaj,
Laŭ takto de Budho, kapojn skuante.
Monstroj, fantomoj, spiritoj, demonoj,
Eliru el tomboj, el marĉoj, el l' lago,
Aliĝu, aliĝu, sed neniam ja Tigrino.
Ho, ĥaj. Ho, ĥaj. Ho ĥaj. Ho ! »

« Strange », tiel pensis Tigrino, kiu sin kaŝante enrigardadis la internon de la ĉeftemplo. « Ne povas esti, ke ili konas mian moknomon. Kredeble, ili menciis veran tigrinon. » Ŝi ŝirmis sian kapon kaj vizaĝon per la antaŭtuko kiel masko, kaj ŝteliris al la ringo de la dancantoj. Ŝi enmiksiĝis en Dek ses Araĥanojn kaj kune dancis. Ŝajnis al ŝi, ke neniu rimarkis ŝin. Post sufiĉe longe Budho ĉesigis la dancadon kaj direktante sian nazon iom supren ekflaris ian odoron. « Odoras je fiŝajoj ! Ĉu iu fiŝspirito de la lago aliĝas al ni ? La odoro ion al mi rememorigas. Iam mi manĝegis fiŝaĵon ĉiutage. » Budho gaje ekkantis :

« Ne min plu insultu, nomante min Kataĉo.
Kataĉo povas surmeti getaojn sur du piedoj.
Kataĉo povas apogi sin sur promenbastono.
Kataĉo povas sinvesti per tinkturita banvesto.
Miaŭ, miaŭ, njago, njan ! »

La kovraĵon ĵetante ŝi kriegis : « Fi, Kataĉo ! Mi venĝu la morton de mia fratino ! »

Budho harojn hirtigis. Fulmorapide ŝi ekkaptis la nukon de Budho, ĵetegis lin kontraŭ la ĉefkolonon per la tuta forto. « Gjaŭo ! » Budho ŝanĝiĝis al la nigra kato granda kiel hundo. Samtempe, dek ses sovaĝaj katoj diskuris ĉien, kvazaŭ korvaro ŝtonon ricevinte.

Tradukis kaj kompilis ZIN Kiyosi.

SCIENCFIKCIO :

laù prelego prezentita en Grezijono la 15 an de Julio 1978

Kion la homoj ne konantaj ĝin imagas esti sciencfikcio

Multaj homoj, kiuj ne kutime legas sciencfikcion, okaze vidis en kinejo, aŭ pli verŝajne ĉe la televido, filmetaĉon kiu prezentas strangajn maŝinojn, plimalpli nedigesteblajn monstrojn, kie la rolantoj estas apenaŭ verŝajnaj pupoj, kiuj krias en plej stulta maniero. Do se oni ne konas sciencfikcion, nur tiujn filmetaĉojn, oni sin prave demandas kiel estas eble, ke maturaj homoj sin okupas pri tiel bagatela kaj senvalora afero. Feliĉe, kiel mi provos montri, sciencfikcio estas multe pli riĉa laŭ enhavo ol tio, kaj meritas atenton.

La pioniroj de sciencfikcio

Kvankam oni povas trovi radikojn de SF jam en sufiĉe fora pasinteco (oni pensu pri Cyrano de Bergerac kaj liaj vojaĝoj al la luno kaj al la suno), tamen du aŭtorojn oni konsideras kiel la verajn antaŭulojn de SF : ili estas Jules Verne kaj H.G. Wells.

Pluraj el la romanoj kaj inventoj de Jules Verne estas mondfamaj ; ĉiuj legis aŭ aŭdis pri la submarŝipo de kapitano Nemo, aŭ pri la aviadilo de Robur, ktp. En tiuj romanoj la teknikaĵoj ludas gravan parton, ofte esencan, ĉar sen ili la historio ja tute ne povus okazi. Krome Jules Verne zorgis, ke tiuj estu almenaŭ teorie fareblaj, en la tiama stato de tekniko kaj scienco. La submarŝipo de kapitano Nemo estis jam en tiu tempo konstruebla, kvankam oni provante la konstruon trovus sufiĉe malfacilajn problemojn. Tamen Jules Verne konstante zorgis pri plena verŝajneco de la priskribataj maŝinoj ; ĉi-tiun zorgon komplete formetis la modernaj aŭtoroj de SF.

Ekzempla ĉi-rilate estis H.G. Wells, kaj la ŝatantoj de SF pli volonte konsideras lin pioniro de SF ol Jules Verne-on. En « La unuaj homoj sur la luno » aŭ en la « Tempomaŝino », Wells imagas, oni povas eĉ diri elfantazias sciencajn teoriojn, el kiuj teknikoj estas konstruebla j, kaj ebligas ĉu spac-, nur ĉu tempovojaĝon. La koncernaj teorioj ne bezonas esti tute verŝajnaj ; gravas nur, ke oni povas fari al si plimalpli klaran bildon pri iliaj aplikoj, tiel, ke la intrigo povas malvolviĝi en sufiĉe logika maniero. La sciencistoj ĉe Wells montras ankaŭ neverŝajnecon : ili estas izoluloj, kiuj sole en sia ĝardendometo komplete inventas novan sciencan teorion kaj konstruas komplikajn aparatojn ; tiu romantika imago de la sciencistoj havos longan vivon, ĉefe en la malaltnivelaj produktoj.

Moderna Sciencfikcio naskiĝis en Usono dum la jaroj 1920 aj. Tuj post la unua mondmilito, Usono aperis kiel potenca lando kun ekzemplodona politika sistemo, kun dinamika provado de ĉiuj teknikaj rimedoj por ĉiuj problemoj. La unuaj verkoj de SF, cetere apenaŭ legeblaj nun, reliefigas tiun kredon, ke per teknikoj oni povos solvi ĉiujn problemojn, kaj ke la usona politika sistemo estas la idealo ĉie realigota. El tiuj unuaj provoj kreskis matura literatura formo kiam kapablaj artistoj aplikis sian imagon kaj kritikan senton al la verkado de SF.

Kio karakterizas modernan Sciencfikcion

Temas ĝenerale pri aventurromanoj aŭ -noveloj. La pli granda parto aperis novelforme en revuoj. Kia ajn la amplekso de SF a verko, fonas ĉiam pli aŭ malpli videble du elementoj :

1 — neekzistanta tekniko, derivita el jam konata aŭ el imagita scienca fako. Se unuopaj teknikaĵoj ludis gravan rolon en frua sciencfikcio, en la moderna temas ĝenerale pri kohera teknikaro, komparebla kun la aro de teknikoj nun uzataj.

2 — Certa socia organizo, en kiu la menciita teknikaro ludas gravan, eĉ esencan rolon. Tiu socia flanko estas fundamenta en matura sciencfikcio, kaj ĝi ofte permesis al aŭtoroj esprimi aŭ pritrakti politikajn opiniojn. Tiu socia organizo estas konsiderata nek kiel ideala, kio diferencigas SF on de utopio, nek malideala, kontraste al malutopio.

Sur tiu fono la aventuroj de la heroo (j) devas formi interesan kaj allogan rakonton, kiu havas rilaton kun la fono. Iuj difinis sciencfikcion kiel rimedon pritrakti variajn ideojn en romaneska maniero.

Unu baroka aŭtoro : van Vogt

El lia ampleksa verkaro mi pritraktos nur unu romanon, duvoluman, kiun oni ofte konsideras lia ĉefverko : la mondo de ne-A. Ne-a signifas ne-aristotela. En la romano interplektiĝas pluraj temoj.

Unua temo : sur la Tero regas socia kaj rega sistemo inspirita de la ne Aristotela logiko, laŭ la indikoj de Korzybski en la libro « Science and Sanity », tio estas scienco kaj mensa saneco. Fundamenta por tiu sistemo estas la konstato, ke la klasika logiko, kia difinis ĝin Aristotelo, ne taŭgas por la moderna scienco kaj do por la moderna mondo. Korzybski proponis do sistemon por reformi la penson, tiel konscian kiel nekonscian, kun la celo, ke persono, kiu perfekte asimilis ĝin, kondutos kiel bona civitano, kun plena sento pri sia respondeco kontraŭ la aliaj kaj kontraŭ la socio. Van Vogt studis tiun libron, entuziasmiĝis pri ĝi, kaj ekverkis la libron, pri kiu nun temas. Do sur la Tero la civitanoj estas nearistotelanoj, kaj pro tio ne necesas polico, karceroj ktp. Ĉiu junulo, post la lernotempo, iras al la Maŝino de la Ludoj, kiu estas giganta komputero, kiu per diversaj demandoj (la ludoj) taksas la kapablon de la demandato kaj proponas al li taŭgan postenon. Sed venis de ekstere komplotuloj, kiuj per speciala aparato ĵamas la Maŝinon kaj tiel enŝovis en la regaparaton perfidulojn (vidu pri la dua temo). Kiam okazis la ekstera atako kaj la Maŝino estas detruita, montriĝas tamen, ke la tera socio mem ne estas detruita, pro la persona aliĝo de ĉiuj civitanoj al ĝia sistemo. Tiu socio, cetere neagresema, aspektas modela.

Dua temo : la Galaksio entenas multajn loĝatajn planedojn, el kiuj la plimulto formas malstriktan Federacion. Krome ekzistas potenca kaj agresema Imperio, kies estro, Eriko la Ruĝa, montras plurajn trajtojn de ankoraŭ infaneca, de ne plene evoluinta, karaktero (tio fontas el psikoanalizo, kaj estas efektive parto de la ne A sistemo de Korzybski). Per tio klariĝas lia agresemo. La Imperio provas konkeri la Teron, sed devas agi kaŝe, ĉar rekta atako kaŭzus

reagon de la Federacio. Jen kial la Imperio provas inciti ribelon sur la Teron enŝovante perfidulojn kaj spionojn.

Tria temo : la heroo aperas en la komenco de la romano por viziti la Maŝinon de la Ludoj, kaj tie ekscias, ke ĉiuj liaj rememoroj pri infanaĝo kaj juneco estas falsaj, ke li ne povas esti tio, kion li pretendas esti. Dum la sekvo de la romano, dum la krizo eksplodas, li provas ekscii kio li estas, kiuj estas liaj kapabloj, por malkovri, ke li ludas ŝlosilan rolon, ke oni povas lin kompari al ŝakpeono sur la sepa vico, damiĝonta. Ĉi tiu temo, kiu pensigas pri la antikva devizo « Gnoti seavton », (konu cin mem) estas (en diversaj formoj) ofta en la romanoj de van Vogt.

La rakonto malvolviĝas en komplika maniero ; la krizo eksplodas, la heroo trovas sin implikita en ĝian evoluon samtempe, kiel li iom post iom malkovras, ke li posedas eksterordinarajn kapablojn, ludontajn kompreneble decidigan rolon. Dum tio aperas sciencisto, kiu delonge planis la defendon de la Tero (la romantika figuro de sciencisto, tiel ofta en SF), pastro influanta la Imperiestron, kaj maŝino, kiu posedas konscion kaj fine helpas Gosseyn (la heroon) ekposedi sian tutan personecon kaj venki la atakinton.

La tuta rakonto estas multe pli komplika, ol mi skizas ĝin, kaj fakte neresumebla. En alia romano de van Vogt troviĝas la esprimo « dentradaroj en dentradaroj en dentradaroj... » kio plene karakterizas la manieron de la aŭtoro. Oni neniam povas esti tute certa, ke oni plene komprenis la kompletan arkitekturon de la rakonto, kiun ornamas cetere tre poeziaj kaj elvokivaj priskriboj (la arboj-domoj de Venuso, ekzemple). Dank'al tio van Vogt sukcesas doni la impreson de neelĉerpebla vivo, ne finpriskribebla (kio denove konformas al la preceptoj de ne A).

Unu klasika aŭtoro : Isaak Asimov

Tiu estas alia grandulo de SF, kiu en tre preciza maniero, tute kontraŭa al tiu, vivoŝpruca, de van Vogt, pritraktis preskaŭ ĉiujn temojn de SF. Mi parolu ĉi tie pri la vico da noveloj kaj du romanoj, en kiuj li pritraktis la robotojn. Tiuj aperis kun tiu nomo en la romano de la ĉeĥo Karel Čapek, RUR (Rossum's Universal Robots). Robotoj estas maŝinoj, kiuj havas altajn intelektajn kapablojn, homnivelajn, kaj la forton kaj daŭrecon kaj fidindecon de maŝinoj. Ekzemple, kiam ili ion lernis aŭ eksciis, tion ili neniam forgesas. Post Čapek, multaj aŭtoroj reprenis la temon de robotoj, ĝenerale por pritrakti ilian ribelon kontraŭ la homoj. La religia fonto de tiu temo estas evidenta : temas pri la ribelo de la malbonaj anĝeloj, pri la malobeo de Adamo, ktp. Sed iam, dum la jaroj 30aj, Campbell (pr. Kemel), ĉefredaktoro de grava SF revuo, rimarkigis al Asimov, ke, se la homoj konstruus robotojn, tiujn ili provus konstrui neribelkapablaj, same kiel oni konstruas pontojn, por ke ili rezistu al ŝarĝo kaj ne kolapsu sub aŭto. Asimov pripensis tiun rimarkon, kaj elpensis tri regulojn, la tri leĝoj de robotiko, kiujn li uzis en sia verko, kaj kiun la postaj SF aŭtoroj tre ĝenerale akceptis, se ili en siaj verkoj metis robotojn. Jen tiuj leĝoj :

1 — Roboto ne rajtas, aktive aŭ pasive, kaŭzi malbonaĵon al homo.

2 — Roboto devas ŝirmi sian ekziston, se tio ne kontraŭas la unuan leĝon.

3 — Roboto devas obei al homo, se tio ne kontraŭas la du unuajn leĝojn.

Oni notu, ke ekzistas strikta hierarkio inter la tri leĝoj. Sendanĝereco de homoj estas nepra. Asimov supozas, ke iam en la estonteco oni sukcesos konstrui robotojn ekipitajn de cerbaĵo (la pozitrona cerbo) en kiuj estas neeviteble enkonstruitaj tiuj leĝoj, kiel integra parto de la mekanismo. Cetere ne genia izolulo konstruos ilin, sed ja la inĝenieroj, teknikistoj kaj laboristoj de potenca kompanio : temas pri tute realisma kompreno de scienco kaj tekniko en moderna socio. La unua leĝo interalie malpermesas absolute militan uzadon de robotoj, kio ludas ian rolon en la romano « The naked sun » (Senŝirme sub la suno). Alia, malpli evidenta konsekvenco, estas, ke roboto ne povas esti ĥirurgo, ĉar ĝi tiel vundus homojn.

Dank'al la tri leĝoj de robotiko, robota ribelo estas neebla. Oni povus do kredi, ke la temo tial iĝis neinteresa. Ĝi ja iĝis malpli romantika, sed laŭ mi multe pli interesa. Povas ekesti konfliktoj inter la postuloj de la tri leĝoj, pro difinitaj cirkonstancoj, kaj Asimov, en vico da noveloj kaj en du romanoj, majstre ekspluatis la eblecojn de la temo, per subtila logiko.

Unu ekzemplo, el la plej simplaj, sufiĉu. En unu el la noveloj, robotoj, kiuj devas elfosi ercojn, anstataŭ iri al la mino kaj labori, stulte kuradas ĉirkaŭ la ĝusta loko, kaj la respondecaj inĝenieroj ne komprenas kial. Oni do konsultas robotan spertulon, Dron Susan Calvin pri kiu la aŭtoro skribas, ke pro longa intimeco kun la robotoj, ŝi iĝis pli robota ol la robotoj mem. Ŝi, per detala demandado, sukcesas ekscii, ke la ekspluatota erco estas radioaktiva. Sed la robotoj perceptas radioaktivecon, kaj scias, ke tiu estas danĝera por ilia cerbaĵo. Do tiuj, kiuj ricevis la ordonon iri al la mino, pro la tria leĝo ekiras obeeme, sed kiam ili alvenas je danĝera distanco ili ne povas iri plu, do provas ĉirkaŭi la obstaklon. Temas pri ankoraŭ primitivaj robotoj, tial ilia stulta ĉirkaŭkurado. La konsilo estas tiam evidenta ; oni provizas ilin par ŝirmilo kaj ili povas plenumi sian taskon.

Ekologia romano : Dune, de Frank Herbert

La interrilatoj inter homo kaj naturo ludas kompreneble sufiĉe gravan rolon en SF, inter-alie pro la supozataj eblecoj transformi la klimaton, flaŭron kaj faŭnon de tuta planedo, sed kutime la ebleco estas nur aludata. Aŭ, en la plej primitivaj romanoj oni supozas, ke en la daŭro de kelkaj monatoj tiu tasko estas efektivigebla, kio ne aspektas tro serioza. En Dune ĝi ludas gravan rolon.

Unu el la rolantoj ĉefaj en tiu ĉi romano estas ja planedo, Arrakis, alinome Duno. Ĝi en la komenco estas preskaŭ tute okupata de dezerto terure arida. En la dezerto promenas monstraj vermegoj, domaltaj, treege danĝeraj. Ĝin loĝas homoj, kiuj vivas en kavernoj kaj pro la sekega klimato portas tute fermitajn vestojn, por plejeble malhelpi perdon de korpa akvo. La vestoj distilas la ŝviton kaj urinon kaj la homoj trinkas la tiel rehavatan akvon. Ili kompreneble havas tre rigoran socian sistemon, pro la neceso severe ŝpari la tiel malmultan akvon. Parto de la romano rakontas pri la longa, multgeneracia luktado por rehumidigi la planedon kaj fertiligi ĝin.

Al tio kompreneble miksiĝas aventurromano, kiu malvolviĝas en la kadro de feŭda imperio etendiĝanta sur multegaj stelsistemoj. La nobelaro interbatalas laŭ tre komplikaj reguloj kaj la aŭtoro tre lerte priskribas la miksaĵon de barbareco kaj alta civilizo de tiu imperio. Alia grava parto de la rakonto estas la naskiĝo de religio ĉirkaŭ juna nobelo, ekzilita sur Dunon, kiu prenas la rolon de Mesio. Lia psikologia evoluo, ĝis memvola retiriĝo, estas majstre montrata.

(daŭrigota)

VILEM.

Klarigo : S.F. : mallongigo por sciencfikcio.

POR VIA DISTRO

NOVAJ PROBLEMOJ LA KVADRATOJ


Ĉiu el tiuj kvadratoj entenas kvin vortojn. Ĉiu vorto havas kvin literojn ; Tiuj kvin vortoj estas anagramoj t.e. ili estas formitaj per la samaj literoj. Ĉiuj literoj estas anstataŭitaj per signoj sed la signoj ne havas la saman signifon en ĉiu krado.


Sciante, ke :


— en la unua kvadrato estas la vorto « korpa »,

— en la dua kvadrato estas la vorto « trafo »,

— en la tria kvadrato estas la vorto « rabos », trovu la aliajn vortojn.







Unuaj frazoj... titoloj... aŭtoroj...

Jen la unuaj frazoj de tre konataj verkoj — originale skribitaj en Esperanto aŭ Esperanten tradukitaj. La aŭtoroj estas Auld, Baghy, Boulton, Engholm, Forge, Lorjak, Otĉenašek, Orzesko, Privat, Schwartz, Szathmàri, Szilagyi, Valano, Zweig.

Kiu aŭtoro skribis tiujn frazojn kaj kiu estas la titolo de la libro ?

1) Kial vi ne venis pli frue ?
2) Johano sidis ĉe la fenestro, rigardis en la senstelan nokton.
3) Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben...
4) Bonan tagon ! — li diris enpašante — Ĉu vi ne rekonas min ?
5) Malnovaj domoj estas kiel maljunaj homoj plenaj de rememoroj.
6) Meze inter Oriento kaj Okcidento kušas Litva lando...
7) Horloĝo super mia skribtablo ekparolas per kvinobla bato.
8) Du knabetoj ludis en la sablo.
9) Polica detektivo Jano Karal ridetis ravareve.
10) La vivo de virino estas eterne brulanta flamo de amo, diras unuj.
11) Leo ankoraŭ pašadis en sia ateliero.
12) La lokomotivo ekkriis raŭke : la stacio Semmering estis atingita.
13) « Ha, skorzonero ! » grumblis Auchoux, la ĉefĝendarmo...
14) Senpacienca knabinkrio : — Karlo, for el la lito, mi devas vin lavi.

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Krucvortoj :

En nia lasta problemo enŝoviĝis grava eraro : la difinoj 8-Vertikale fakte koncernis la kolonon 9, kaj plie mankis la difinoj por la kolono 8. Pri tiu eraro kulpas nur la Redakcia Sekretario. Li esperas ke vi bonvolos senkulpigi lin, kaj ke vi tamen trovis la solvon.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
I	G	R	A	T	I	F	I	K	O	■	O	B
II	R	A	B	I	■	R	E	L	I	K	V	O
III	I	D	I	O	T	O	■	I	S	■	O	V
IV	F	I	O	L	■	S	O	N	O	R	I	L
V	E	K	■	O	S	T	R	O	■	A	D	O
VI	L	■	E	■	P	I	A	S	T	R	A	■
VII	■	I	N	S	I	G	N	■	I	A	■	T
VIII	F	R	U	K	T	I	■	A	R	■	F	R
IX	A	I	■	R	E	L	I	G	I	U	L	O
X	T	■	T	I	M	O	N	O	■	N	I	M
XI	A	R	A	B	A	■	I	N	■	U	R	B
XII	L	E	G	I	■	A	C	I	D	E	T	A

GRAMATIKO PER BONHUMORO

APUD

Difino : Prepozicio montranta, ke iu aŭ io estas pli-malpli proksima al iu aŭ io — sed ne tuŝanta ĝin.

— Li sidas apud la fenestro ; li estas pigmeo apud giganto.

Ni komparu : li staras apud la muro (ne tuŝas ĝin).
li staras ĉe la muro (li tuŝas ĝin).

RIMARKOJ

Pozicion montras [Apud]

— Joĉjo, apud sia patrino, marŝas sampaŝe kiel ŝi.

Almovon montras [N] post apud :

— Maria malfruis antaŭ formikejo kaj kuras apud sian fraton.

Derivado — Kunmetado

— Li loĝas en apuda kvartalo — la ĉapelo estas sur la tablo kaj la gantoj kuŝas apude — vidu ĉi-apude la novajn librojn.


— La apudmara regiono allogas min — la apudurba parko estas pli silenta — lia apudesto kuraĝigis ŝin — apudiru la urbodomon kaj atendu la aŭtoĉaron — apozicio estas apudmeto de du substantivoj.

— Apudiri — apudmeti — apudesti.




Antaŭ-zorgado

Kara Sinjoro, ne forgesu, ke la kliniko apudestas vian hotelon ; ĉu kiel pasintan jaron, mi devas sendi viajn poŝtaĵojn al la kliniko ?



Oni devas vivi laŭ sia tempo

Kiel ! Ne estas banĉambro ! Adiaŭ, mi preferas flugi apuden, ĉe via kuzo. Li varme amindumas al mi ; cetere, kiam mi vizitis lian hejmon, il permesis al mi uzi lian banujon.





Evidenteco

Certe, la rakontoj de nia infanaĝo enigis en niajn korojn strangajn kompleksojn ; ĉu, apud Ruĝĉapelulineto vi ne sentas vin Lupo ? Konsentite ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (240 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Fransisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (40 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 5 de 1978, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La réunion du Conseil d'administration, qui a eu lieu le 22 octobre, a fait le point sur la « saison » 1978. Il s'est avéré que le nombre de « journées-stagiaires » a été moindre que l'année dernière et que, par conséquent, les disponibilités pour 1979 sont inférieures. Certaines améliorations prévues devront donc attendre.

Le programme des activités 1979 a été mis au point, quant au calendrier des stages et à l'amélioration de chacun d'eux. Ce calendrier paraît dans ce numéro. Nous avons repris la rencontre d'enfants pour les vacances de printemps et le découpage des mois d'été sera le même que l'an dernier. Les conférences seront, autant que possible, axées sur un thème différent chaque semaine. Les cours de pratique de la langue et le cours supérieur seront basés sur des « ateliers » de conversation, de traduction, d'étude d'une œuvre, etc... Les activités privilégiées de la troisième période seront manuelles, l'accent portant en particulier sur la photographie, prise de vue, développement, réalisation de montage, etc... Cette activité et les autres se dérouleront évidemment en esperanto. Des cours auront lieu également pendant cette période. D'autre part, pendant les deux premières périodes, il sera possible d'organiser un atelier « théâtre ».

Le 22 octobre, les discussions ont porté, entre autres sujets, sur la nécessité d'intéresser de nouveau amis à la gestion des stages. Pour cela, il est fait appel à ceux d'entre vous tous qui aimeraient ou accepteraient de s'initier soit à l'aspect intendance, soit à l'aspect administration de cette gestion, en vue d'un partage des responsabilités par la suite. A chacun des stages de 1979 un(e) intendant(e) et un(e) administratif(ve) pourront être adjoints aux responsables. Ils jugeront du travail à faire et seront alors à même de s'engager ou non à nous aider.

P. BABIN.

Inter Ni

Dum la jaro 1978 la Kulturdomo estis vizitata de malpli da gesamideanoj ol la antaŭan jaron. La realigo de parto el la riparoj antaŭviditaj estos prokrastita.

La 1979-programo estis planita okaze de kunveno de la konsilianoj. Printempe okazos la kutima, lastjare sukcesinta, renkonto de infanoj. La kalendaro de la someraj aktivaĵoj restos sen-ŝanĝa. Kvankam kursoj okazos dum ĉiu el la tri periodoj, la unua estos ĉefe dediĉita al prelegoj (tri temoj), la dua al kursoj diversnivelaj, la tria al artlaboroj, kiel foto (fotado, rivelado, realigo de ekspozicio). Dum la du unuaj periodoj okazos teatra laboro.

Okaze de la kunveno estis decidite inviti amikojn, kiuj konsentus helpi nin per respondeco en iu somera periodo, sin anonci. Du el ili (unu por la « kuireja flanko », dua por la « oficeja ») povus labori kaj iniciiĝi kun la respondantoj.

RESULTATS DES EXAMENS

Grésillon 1978

Atesto pri Elementa Lernado. — Gérard Suzanne, Beun Patrice, Beun Annie, Bodson Sophie, Cathala Gaston, Chaudouard Fernande, Daoust Simone, Daoust Hervé, Delcourt Denise, Delcroix Marianne, Décobert Hélène, Dubois Claude, Dumas Annie, Dumas Olivier, Dumas Yves, Duwat Jean-Pierre, Feneyrol Gaël, Gerbeaud Jean-Jacques, Gerbeaud Nicole, Gasquet Paulette, Guérin Pascal, Guillotte Frédéric, Larose Colette, Pierre Alain, Tabel Mady.

Atesto pri Praktika Lernado. — Cathala Gaston, Daoust Hervé, Delcourt Denise, Delcroix Marianne, Durandeau Lucienne, Durandeau Jean-Pierre, Lassarte Sylvette, Soulier Ginette, Tabel Mady, Vivier Bernard.

Atesto pri Kapableco (parola parto). — Bertin Christian, Binche Marc, Coquin Roger.

Atesto pri Pedagogio. — Kristos Hélène.

LA REVUE

Le bilan de fin d'année nous a montré que la revue avait un déficit important. Nous n'avons pas augmenté le prix de l'abonnement depuis fin 1975. Depuis cette date, les frais d'impression et postaux ont considérablement augmenté. Nous avons donc décidé de porter le prix de l'abonnement pour 1979 à 40 francs. Nous ne proposons pas de tarif d'abonnement de soutien laissant à chacun la liberté de décider d'un effort supplémentaire éventuel comme beaucoup d'entre vous l'ont fait spontanément jusqu'ici.

Ceux d'entre vous qui ont réglé leur abonnement avant que paraisse ce numéro jugeront s'ils doivent nous faire parvenir un complément. Merci.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1978 (suite)

J. Guillaume (78)	30
R. Llorens (06)	50
M. Andreasson (Suède)	30
R. Despiney (94)	30
E-grupo Valenciennes (59)	30
H. Schutt (All. féd.)	100
E. Eggers (All. féd.)	100
C. Rouquet (14)	30
J.-P. Vilheim (59)	30
Y. Martinot (10)	30
S. Bourot (10)	30
G. Rabin (49)	30
H. Ménard (44)	30
G. Dairon (86)	30
E. Richard (44)	30
G. Offroy (57)	35
G. Coppens (Pays-Bas)	50
M. Alberto (Belgique)	30
E. Vanneau (75)	30
J. Duvacher (49)	30
W. Grela (Belgique)	30
J. Weidacher (All. féd.)	30
R. Coquin (11)	30
C. Mounier (30)	30
H. Benaïm (47)	30
C. Tulasme (49)	30
M. Bossard (44)	30
A. Lherbier (72)	30
A. Ribot (47)	30
D. Vergnac (47)	30
N. Mouneyrou (47)	30
H. Van Roye (Belgique)	30
M. Sol (33)	30
B. Capit (44)	30

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1979

(première liste)

M. Glaser (All. féd.)	50
R. Doury (93)	50
A.-M. Chaney (75)	50
F. Maury (69)	50
Total :	**1.360**

NOS PEINES

Sinjoro Edgar Perseke est décédé à la fin du mois d'août. Pour ceux qui l'ont connu, il n'était pas seulement le montreur de marionnettes, le père de Kasperlo, mais aussi un homme actif, souriant, toujours de bonne humeur.

Nous avons fait part à sa famille de la peine de tous ses amis.

INTERNACIA ATESTO PRI ELEMENTA LINGVOSCIO

Sukcesis : Beets Leopold, Bridgeland Dorothy, Einihovici Idyss, Faridinya Nahid, Heshmat Faraji, Faraghi Giti, Seghatoleslami Haideh, Stevens Kenneth, Chaghaghi Hosein Ali.

INTERNACIA ATESTO PRI PRAKTIKA LINGVOSCIO

Sukcesis : Saheb-Zamani Gila, Vereecken Monique, Codice Giancarlo, Codice Florenza, Nielsen Tamiko, Hanke Astrid, Seghatoleslami Haideh, Stevens Kenneth.

Conseil d'administration du 22 Octobre 1978

Présents : MM. et Mmes P. Babin, D. Babin, Bénistant, Boyet, Cheverry, Ciret, Dairon, Guillot, Jelenc, Mathé, Métivier, Micard, Prévot.

La séance est ouverte à 10 heures.

BILAN FINANCIER PROVISOIRE

Il met en évidence une diminution du nombre de nuitées par rapport à 1977. Par suite, les rentrées (séjours, inscriptions et tickets) sont en baisse. Seules, les rentrées librairies ont plus augmenté que l'accroissement du prix des livres.

Il y a eu seulement 37 achats de parts de sociétaires contre 64 en 1977.

Les dépenses d'alimentation et de librairie ont diminué ; mais, il a fallu rembourser un nombre important de parts de sociétaires et anticiper sur le budget 79 pour aménager les chambres extérieures au château.

Les disponibilités sont donc en baisse par rapport à l'année dernière.

Une discussion sur la répartition des nuitées fait apparaître qu'il y a peu de personnes qui assistent exactement à un stage complet. Par contre, 25 % restent 20 jours au moins, leur séjour coïncidant ou non avec un stage. La participation des étrangers, qui font des séjours courts en majorité, est mieux répartie dans le temps.

Il est décidé d'augmenter le nombre des employées de l'été, afin que le service soit effectué dans de meilleures conditions pour tous.

Un débat s'engage sur la possibilité donnée aux stagiaires de participer à la vie matérielle de la maison. Chaque responsable de stage agira comme il le souhaite à ce sujet.

Pour recruter de nouveaux responsables de stage bénévoles, le Conseil d'administration propose de lancer un appel dans « Kulturaj Kajeroj » afin de proposer à des personnes ayant l'intention de venir à Grésillon cet été de faire ce séjour comme stage d'initiation à la gestion (cuisine ou comptabilité) de la maison.

ACTIVITES

Le C.A. étudie les activités et notamment les problèmes des soirées et de la circulation des informations sur les activités.

Il est nécessaire, dans la publicité, de dire que l'on souhaite que les participants contribuent aux soirées. D'autre part, il paraît utile qu'en début de chaque soirée on annonce et mette sur pied le programme du lendemain.

Le rôle du responsable du stage doit être essentiellement de coordonner une équipe comprenant les responsables des diverses activités.

CALENDRIER 1979

Du 11 au 18 avril, *M. F. Le Magadure organise un* stage d'enfants. M. et Mme Guillot proposent de s'occuper de la gestion.

Pour les séjours d'été, il faut déterminer le découpage que l'on souhaite. Des stages de 15 jours ne permettent pas de fonctionner pendant les neuf semaines de la saison. On fera encore des séjours de trois semaines, mais dans un esprit différent.

De plus, il paraît nécessaire d'introduire un stage à dominante « travail artisanal animé en Esperanto ». Cette année, on optera pour la photographie.

On obtient alors la répartition suivante :

Première période. — La gestion sera assurée par Dominique et Pascale Babin. Le programme comprendra des conférences, le matin, centrées sur 3 thèmes (un par semaine) ; par exemple : les droits de l'homme, l'enfant. Si un conférencier se propose, on pourra axer le thème d'une semaine sur le sujet qu'il propose. L'après-midi, auront lieu des cours d'initiation, et on peut mettre sur pied un atelier de traduction de livres qui devrait fonctionner tout l'été.

Deuxième période. — Responsables de stage : M. et Mme Babin.

Cours le matin, car un des rôles de Grésillon est de former des enseignants en Esperanto ; mais le but de ce stage n'est pas la préparation aux examens, celle-ci ne pouvant se faire en un seul stage. Seul le cours 1er degré nécessiterait une présence de trois semaines. Le cours supérieur sera axé sur l'étude de trois œuvres différentes (une par semaine).

Des activités manuelles ou artistiques, coordonnées par Nicolas Babin, seront organisées, comme au premier stage.

Troisième période. — Responsable de stage : M. et Mme Mathé. Stage Photographie.

Le matin : initiation au maniement d'un appareil photo, à la prise de vue, au développement et au tirage sur papier.

Ce stage recevra un support linguistique sous forme d'un cours, l'après-midi.

Les cours, cet été, seront en partie assurés par Mme Vincent, Mme Mee, Mme Kristos. M. Boyet se propose pour participer aux conférences.

Pour faire connaître les stages, il est proposé de diversifier la publicité en la faisant éventuellement passer dans des revues non espérantistes (de photographie, par exemple).

TRAVAUX

On envisage, en priorité, l'isolation phonique de la nouvelle salle de cours et la réfection du couloir du deuxième étage.

DIVERS

— Proposition de Mme Humm : le concours de films et diapositives qu'elle envisage ne peut être organisé en 1979. Le C.A. lui propose de mettre son projet sur pied pour 1980 en l'exposant dans un article de la revue, par exemple.

— Mme Vincent a entrepris de ranger la bibliothèque et d'établir un nouveau fichier.

— **Tarifs :** ils seront augmentés dans la même proportion que les salaires du personnel, soit de 10 %. Les tarifs préférentiels pour les stages, payés en entier d'avance, *sont supprimés.*

La séance est levée à 16 h. 30.

La secrétaire de séance,
E.-L. MATHÉ.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	15,00
Pendentifs	:	15,00
Pendentifs grosse étoile	:	25,00
Coupe-papier	:	25,00
Disques de stationnement	:	5,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	3,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

ALBERTO FERNANDEZ

SENĜENAJ DIALOGOJ

Popularscienca esploro de

Fundamentaj demandoj